

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun Unesko)

Wells pri 40 jaroj
Nova Estraro
Zamenhof-premio

Tampereeo: Ĉu eblas superi ĝin?

Enhavo

- 141 80-a Universala Kongreso, Tampere, 22-29 julio 1995:
Spegulo de movada viglo
- 142 Kvardek jaroj en retrospektivo (festparolado de John C. Wells)
- 144 Solena Inaŭguro: Veke vibris verda voko
Mesaĝo de Unesko (Colin Power)
- 145 Zamenhof-premio al la finna prezidento
- 146 Komitato: Estraro el tri mondpartoj (Osmo Buller);
Komitato de UEA por 1995-1998
Saluto de d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof
- 148 Kongresa Temo: Unu mondo *kun* disaj eroj (Gilbert Ledon);
Postuli logikecon estas utopie (Andy Künzli)
- 149 Intervjuo kun LEE Chong-Yeong: Atingi la nivelon de "kriza maso"
- 150 UN-modelo: ĉu tro fidela?
- 150 Internacia Kongresa Universitato: Fari notojn konsilindas
(YAMASAKI Seikō); AISIKU unuafoje (Daniel Pfeiffer,
Antoine J. Mechelynck); Spuristo spurita (Marjorie Boulton)
- 151 Akademio: Ĉu (mal)tro? (Bertilo Wennergren)
- 152 Kulturaj programoj: Kaj komencis kune kanti ...; Sorĉis verdaj
vortoj (Ana Manero, Perlo Miela); Esperkantoj dumkongresaj
(Perlo Miela); Ĵetu la ritmomaŝinon (Miko Sloper); Spektaklaj
solludoj (Gerrit Berveling); Persone distris energie (David Gaines);
Lukaŝoj kiajn malhavas multaj lingvoj (István Ertl)
- 155 Laste aperis
- 156 Belartaj Konkursoj: Nova Talento unuafoje el Ĉinio;
Belartaj Konkursoj de UEA 1995
- 157 Solena Fermo: Nova estraro sur la estrado; Kongresa rezolucio
- 158 Kongresa kroniko

Vi trovos

novan Estraron, kun anoj plejparte novaj, en la kolofono. Temas pri la unua UEA-Estraro kiu povos eĉ ĉiutage "kunsidi", dank' al elektromika poŝto: rimarku ke kvin el la sep estas atingeblaj per ret-adreso! Prezento de unuopaj estraranoj sekvas en oktobro. Tamen, intervjuon kun prezidanto LEE Chong-Yeong vi legos jam sur p. 149.

Prezidinto John Wells rerigardas (p. 142-43) al siaj kvardek jaroj da movada vivo kaj admonas ne foruzi niajn fortojn en bataloj internaj. Alie, la movadon daŭre povus gantgredi tiaj kvereloj kaj skismemoj kiaj plagis Esperanton de post la Hamburga UK (1974). La festparolado de Wells estas nur unu el la garantioj ke ne sole kongresintoj legos ĉi tiun numeron kun intereso.

Pro manko de spaco, kelkaj tekstoj kongres-rilataj devos atendi oktobron, same kiel raporto pri aliaj someraj E-eventoj. Aliflanke, la rubriko "Laste aperis" (p. 155) senprokraste prezentas almenaŭ parton de la novaĵoj kiuj premieris en la Tamperea libroservo.

Kovrilo kaj bildoj: Krom se alia nomo estas indikita, nia danko iras al la kongresa fotoservo (Mauno Honkanen – Kuvamanu Ky).

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuj ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; tel. +82-53-950-5425 (o), +82-53-765-0880 (h); faks. +82-53-950-6247 (o), +82-53-765-0881 (h); retpoŝto: keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (disvastigo/informado): Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko, ILEI): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.


Ĝenerala Sekretario (eksteraj rilatoj, strategia planado): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; tel. +1-613-565-9282 (o/h); faks. +1-613-565-9279 (o/h); retpoŝto: mfettes@magi.com.

Estrarano (financa politiko, buĝeto): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; tel. +31-5284-1214 (h), +31-50-613769 (o); faks. +31-50-613763 (o); retpoŝto: azgiow6lfred@relay.nl.net.

Estrarano (disvastigo/informado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; tel. +370-7-738776 (h), +370-7-208242 (o); faks. +370-7-204970 (o).

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39-6-39-72-61-98 (h); faks. +39-6-39-72-61-69 (h); retpoŝto: mlip.sato@iol.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; tel. +972-8-264462 (h), +972-2-658-6860 (o); faks. +972-2-658-4437 (o); retpoŝto: amri@vms.huji.ac.il.



Spegulo de movada viglo

**Speguliĝas dancantoj de la kongresa balo
en la brila plafono de la vestiblo.
Por pli bone vidi ilin, turnu la revuon.**

Ĉu ekzistas recepto por organizi perfektan Universalan Kongreson? Se troviĝas tia, ĝin certe konas la LKK-anoj de Tampere. Jen:

Komencu prepari la pladon almenaŭ kvin jarojn antaŭ la konsumo. Funde studu kiel pretigas ĝin specialistoj alilande, sed insistu pri lokaj aromoj. Dungu sufiĉe da helpkuiristoj, bone difinu kaj kunordigu ilian laboron. Lerte venigu la ingrediencojn el kiel eble plej multaj landoj. Kiam ili alvenas, ne faru el ili kaĉon, sed, post nokta ripozigo en konvenaj ujoj, kunkirlu la tuton tiel ke ĉiu disa ero trovu sian lokon. Spicu ĉion per afablo, helpemo, kaj multe da organiza talento.

Senŝerce, la 2443 aliĝoj el 68 landoj pruvas ke multaj trovis la Tamperean UK-on laŭ sia gusto: post la Jubilea Kongreso en Varsovio nur la Viena UK (1992) allogis pli da esperantistoj. Tamen ĉiu kongresano povis kalkuli pri individua atento en lando kie eĉ unu el la plej grandaj urboj, Tampere, nombras malpli ol 200 mil loĝantojn, kaj kie ĉio funkcias pli hom-skale ol en milion-kapaj metropoloj. Tampereanoj malpli facile evitis informon pri la kongreso okazanta en ilia urbo ol la loĝantoj de Vieno, Valencio aŭ Seulo.

Parte al tiuj modestaj dimensioj de Finnlando ni povis danki la atenton de amas-komunikiloj; aliparte, la lingva problemo ne povis ne interesi popolon kiu ĝin ĉiam spertis

proprasorte pro sia lingva aparteco, kaj kiu lastatempe, post aliĝo al Eŭropa Unio, eĉ pli ĝin konscias.

Tampereon markis finoj kaj komencoj. Finiĝis la mandato de unu Estraro, kaj sekvis ĝin nova teamo (eĉ) pli juna kaj pli tutmondeca. La sep-kapa teamo (meza aĝo: 45 jaroj), kun azia prezidanto kaj entute tri ne-eŭropanoj, havas ŝancon komenci epokon de malpli aŭ eŭropeco. Aliflanke, John Wells, kiu adiaŭis post sesjara prezidado, kredeble fermis movadhistorian ĉapitron dudek-jaran per sia memorriĉa festparolado.

La 80-a mondrenkontiĝo de esperantistoj, 90 jarojn post la unua UK en Bulonjo-ĉe-Mar, ne multe pensis pri propraj datrevenoj, sed turnis sian atenton al la duonjarcenta jubileo de alia institucio, Unuiĝintaj Nacioj. Ties asembleon modelis diverslandaj gejunuloj, kaj ties fundamentaj ideoj kernis en la kongrestemaj debatoj. Post 50 pliaj jaroj UN havas certe tute malsaman vizaĝon. Ĉu ĝiaĉarto kaj agado intertempe evoluos en la direkto kiun sugestas nia kongresa rezolucio?

La Esperanto-movado ĉi-jare distilis el si perfektan Universalan Kongreson. Ĉu: kia movado, tia kongreso? Siavice, la UK metas spegulon antaŭ la Esperanto-movadon: ĉu vere kia kongreso, tia movado? Tiel vigla, laborpreta, iniciatplena? Ĉu ankaŭ tiel sobra, celkonscia kaj bone organizita? ★

Kvardek jaroj en ret

Ekscelenco, diplomataj kaj urbestra moŝtoj, gesinjoroj!

Ĉi tiu estas la lasta Universala Kongreso, kies Solenan Inaŭguron mi prezidos: ĉar venis nun la fino de mia ofic-periodo kiel prezidanto de UEA. Vi bonvolis elekti min al tiu ofico antaŭ ses jaroj en Brajtono, kaj reelekti min antaŭ tri jaroj en Vieno. Sed nia Statuto preskribas, ke du sinsekvaj oficperiodoj estas la maksimumo: do hodiaŭ posttagmeze, post kelkaj horoj, la Komitato elektos novan prezidanton.

Efektive, la jaro 1995 markas por mi persone ne nur la finon de mia gvida rolo en UEA, sed ankaŭ mian formalan atingon de la rango veterano. Por esti veterano de Esperanto oni kalkulas ordinare kvardek jarojn da esperantisteco; kaj miajn kvardek jarojn mi ĵus kompletigis. Mi konatiĝis kun la Internacia Lingvo en la somero de la jaro 1955, kiel lernejo. Mi memoras, kiel mi devis atendi la finon de la lernejaj ekzamenoj en junio por tuj kun granda entuziasmo vori la lernolibron de Esperanto.

Ĉiu, kiu pasigis, kiel mi, kvardek jarojn en la Esperanto-movado, vidis grandajn ŝanĝojn. Ŝanĝiĝis la etoso de la movado, ŝanĝiĝis la stiloj de nia laborado. Antaŭ kvardek jaroj oni povis en mia lando ankoraŭ aranĝi vesperan publikan kunvenon, ekzemple por informi pri Esperanto, aŭ regulan vesperan kurson, kun iom da espero ke ĉeestos publiko. Hodiaŭ tiu maniero vere ne plu estas ebla: multe pli gravas lingvofoiroj kaj televidaj intervjuoj, kaj por la lernanto kelktaga intensa kurso (staĝo). Ŝanĝiĝis la eksteraj materiaj cirkonstancoj en kiuj ni laboras, ŝanĝiĝis eĉ pli la eksteraj politikaj cirkonstancoj de la mondo. Antaŭ kvardek jaroj ni estis en la komenco de la televida epoko, komputado estis ankoraŭ en la eksperimenta fazo, kaj neniuj imagis kasedmagnetofonon, satelitan televidon, telefakson, porteblan telefonon, nek elektronikan retpoŝton. La politika bildo estis la malvarma milito, kun du grandaj blokoj inter si malamikaj, kaj tria mondo kiu ankoraŭ apenaŭ komencis aŭdigi sian propran voĉon. Ne necesas detali, kiel ŝanĝiĝis tiu bildo.

En tiaj cirkonstancoj la Esperanto-movado ne povis resti sama. Ni adaptiĝis al tiaj ŝanĝoj, kvankam ne ĉiam sen problemoj. Sed malgraŭ tiuj aliigoj en la ekstera formo, restis en la Esperanto-movado ankaŭ konstanteco de niaj ĉefaj temoj. Antaŭ kvardek jaroj, same kiel nun, ni vidis akran lingvan problemon en internaciaj rilatoj. Ni vidis malatenton al la homaj rajtoj, interalie al la lingvaj rajtoj, la rajtoj al libera komunikado. Ni konsciis, kiel ni ankoraŭ konscias, ke en la Internacia Lingvo Esperanto ni havas ilon, per kiu oni povas solvi tiun problemon: lingvon politike kaj nacie neŭtralan, lingvon relative facile lerneblan, lingvon kiu prezentas ne ian teoriaĵon sed realaĵon, lingvon principe uzeblan por ĉiu faceto de la vivo, lingvon ja uzatan de popolo disemita tra la landoj de la mondo sed unuigita per sia kapablo paroli kaj kompreni, skribi kaj legi, tiun internacian tuthomaran idiomon.

Kaj ni miris antaŭ kvardek jaroj, same kiel ni hodiaŭ miras, ke la mondo ankoraŭ ne akceptis tiun genian solvon al la problemo. Mi povus tamen longe argumenti, ke okazis tuta revolucio en la sinteno de la amaskomunikiloj al Es-

Fine de la Solena
Inaŭguro de
la 80-a UK en
Tampere,
per jena festparolado
John Wells retrospektivis
siajn kvardek jarojn
pasigitajn en la movado,
dum kiuj li konatiĝis kaj
kunlaboris kun multaj
elstaraj esperantistoj.


La adiaŭanta Wells transdonis la prezidentan martelon al Lee Chong-Yeong, kiu malklare konturiĝas en la mezo, antaŭ mikrofono.

peranto: ili nun postkuras nin, anstataŭ, ke ni postkuru ilin; ni ne plu bezonas ekstazi pro ĉiu alumetskatolo, kiu portas la nomon Esperanto, ĉar por ni nun pledas subite Umberto Eco. Ke nove anoncita Nobel-premiito scias kaj uzas Esperanton — tio altiras pli da ĵurnalisma atento, ol poŝtkarto el eksterlando, kun ekzotika poŝtmarko kaj teksto en Esperanto.

Atakoj kaj honoroj

Rigardante tiujn kvardek jarojn de mia esperantisteco, mi memoras ankaŭ la grandajn figurojn de la Esperanta historio kiujn mi ekkonis. Kiam mi unue lernis Esperanton, la unuaj pioniroj estis ja antaŭ longe mortintaj. Sed en mia unua Universala Kongreso (Mainz, 1958) mi povis konversacii kun Edmond Privat, inter kies verkoj vi eble konas *Aventuroj de pioniro*. Privat estis samlernejo de Hector Hodler; li estis politika ĵurnalisto, verva pledanto por Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, iama prezidanto de UEA. En 1951 UEA elektis lin Honora Prezidanto; sed UEA ne ĉiam superŝutis lin per honoroj. En 1934 oni ne reelektis lin al la Estraro, kaj ne mankis tiuj kiuj akre atakis lin. Vere, jen grava problemo de tempo al tempo en la Esperanto-movado, same kiel en multaj aliaj volontulaj movadoj: ke ni foje atakas unu la alian anstataŭ ataki niajn verajn kontraŭulojn.

Kaj tio kondukas min al la dua granda figuro, kiun mi renkontis frue en mia esperantista kariero, figuro kiu havis tre grandan influon al mi (kaj kompreneble al la tuta Esperanto-movado): Ivo Lapenna. Li estis tiu, kiu konstruis la modernan UEA kaj reanimis ĝin post la dua mondmilito. Li estis ĝenerala sekretario de UEA, li fondis la Centron de



Esploro kaj Dokumentado kaj direktis ĝin en ties heroaj tagoj, li fariĝis prezidanto de UEA. Li instruis tutan generacion da esperantistoj, kiel paroli antaŭ publiko, kiel oratori. Pli grave, li inspiris tutan generacion per fido, ke Esperanto estas ne ia stranga hobiaĵo, sed grava kultura atingiĝo kaj nobla idealo de la homa spirito.

Cetere, se Privat estis la verva pledanto por Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, Lapenna estis la eĉ pli verva, kaj pli sukcesa, pledanto ĉe Unesko. Lia triumfo estis la favora rezolucio pri Esperanto akceptita de Unesko en Montevideo, 1954. (Miaj kunveteranoj, bonvolu pardoni se mi ripetis aferojn bone konatajn: troviĝas inter ni ankaŭ pli junaj aŭ pli novaj e-istoj, kiuj ne scias pri tiu nia historio.)

Akraj esprimoj

Sed ve! Ankaŭ ĉirkaŭ la agmaniero kaj personeco de Lapenna kreiĝis streĉitecoj en la movado. Mi nun ne rakontas pri ili. Pluraj esperantistoj esprimis sin en, ni diru, malĝentila kaj maldigna maniero, uzante vortojn pri kiuj oni devus honti. Ne mankis akraj esprimoj de la alia flanko. Sufiĉas memori, ke en Hamburgo 1974 estis klare, ke Lapenna ne estos reelektita kiel prezidanto. Ne volante malgajni elekton, li retiriĝis kiel kandidato. Tamen poste liaj amikoj ne hezitis priskribi la eventojn de Hamburgo kiel puĉon.

Pasis nun pli ol dudek jaroj post tiuj eventoj. Nun ni povas trankvile rigardi malantaŭen al ili. Lapenna mem mortis en 1987. Mi konfesas, ke mi mem — same kiel supozeble centoj aŭ miloj da aliaj esperantistoj — ĉiam profunde bedaŭris, ke en la fino de tiel brila Esperanta kariero li forpasis antaŭ ol UEA trovis manieron fari kun

li pacon. Kaj tamen tia repaciĝo preskaŭ, preskaŭ okazis. Mi volas rakonti al vi kiel.

En 1987, en la preparlaboroj por la UK en Brajtono (1989), ni serĉis rektoron por la Internacia Kongresa Universitato. Ni havis la ideon inviti profesoron Ivo Lapenna transpreni tiun rolon: li estis perfekta por la rektoreco, estante eminenta universitata profesoro en Londono kaj eminenta esperantisto. Eble tio prezentos manieron rekonduki lin en UEA (same kiel mi jam sukcesis rekonduki lin en la Londonan Esperanto-Klubon). Du el ni — Simo Milojević kaj mi — aranĝis viziti lin en lia hejmo, en Wembley. Li kaj la edzino Birthe afable akceptis nin, kaj ni rapide atingis interkonsenton: ke li akceptos la oficon de rektoro de IKU, se UEA publike deklaras ke ĝi “forte bedaŭras la personajn atakojn, ofendojn, insultojn kaj kalumniojn kontraŭ Prof. D-ro Ivo Lapenna faritajn en ligo kun la elekto de nova Estraro de UEA en 1974”.

Mi ĉiam kontraŭas insultadon kaj kalumniadon, precipe ene de la movado, do mi volonte estus rekomendinta al UEA tiun deklaron. Sed unu monaton poste, Ivo Lapenna mortis. Ni ĉiuj funebris, necesis nekrologi, ne decidis paroli pri malnovaj kvereloj, kaj la afero pri la interkonsentita frazo forgesiĝis.

Meti finan punkton

Mi kredas, ke multaj el ni ankoraŭ bedaŭras, ke la afero tiel restis en la aero. Kaj mi ŝatus nun firme meti finan punkton. Do kiel preskaŭ lastan agon de mia prezidado, mi faras tiun deklaron nun antaŭ vi. *En la nomo de UEA mi ja bedaŭras, ke okazis tiuj atakoj kaj kalumnioj. Mi esperas, ke neniam denove tia situacio makulos nian historion.*

Feliĉe, en la UEA de 1995 ni ĉiuj harmonie kunlaboras. Mi kredas, ke kiel eliranta prezidanto mi transdonas al mia sekvanto asocion en bona ordo, kun gvidorganoj kiuj laboras harmonie. UEA fartas bone. Ni kompreneble dezirus farti eĉ pli bone, sed se konsideri la plej diversajn cirkonstancojn kaj evoluojn, ni devus provizore kontenti. Dum la naŭa sinsekva jaro ni havas individuan membraron super sep mil; la ĉi-jara nombro de pli ol 260 membroj de Societo Zamenhof estas rekorda; UEA estas finance pli forta ol iam ajn antaŭe; niaj periodaĵoj aperas akurate; niaj servoj funkcias glate; ankaŭ ĉi tiu Kongreso surprizis nin per sia grandeco. Tamen, se malkontento estas sprono por aktivaj kaj strebi pli alten, bone, ni do malkontentu!

Fine de mia sesjara prezidanteco, mi dankas vin ĉiujn pro la subteno, kiun vi donis al la Asocio — al via Asocio — dum tiuj jaroj. Mi estas certa, ke vi donos saman subtenon al mia sekvanto. Mi dankas al miaj kolegoj en la Estraro, kiuj kunlaboris kun bona spirito kaj en harmonio. Kaj mi dankas speciale al nia stabo, al la oficistoj de nia Centra Oficejo en Roterdamo, kiuj laboris ĉiam vigle kaj sindone por efektiviĝi la laboron de la Asocio. Ni forgesas foje, ke ili estas profesiuloj, kiuj vere profesinivele laboras. Mi mencias aparte la direktoron de la Centra Oficejo, Osmo Buller, kiu glate kunordigas tiun laboron; kaj tute aparte mi mencias la ĝeneralan direktoron de UEA, Simo Milojević, kiu pli ol iu ajn alia funde konas la Esperanto-movadon, tenante en la kapo la tutan detalaron de ĝia agado, ĝiaj homfortoj, ĝia organiza strukturo, ĝiaj fortoj kaj ĝiaj malfortoj: sen li mia tasko kiel prezidanto de la Asocio estus nemezureble pli malfacila. Profundan dankon al ili ĉiuj! [...]

John C. Wells

Veke vibris verda voko

Sub la leĝeraj, lignaj strukturoj de la salonego de Tampere-Halo, la 1800 sidlokoj aspektis senescepte okupitaj kiam John Wells malfermis la 80-an Universalan Kongreson de Esperanto: sian lastan kiel UEA-prezidanto.

Multaj altranguloj salutis dum la inaŭguro. Alian tagon Alpo Reinivaara, estro de la lerneja fako, akceptis la kongresanojn nome de la urbestro.



Bonvenigante la kongresanojn en Finnlando, Wells rimarkigis ke la lando estas duoble interesa el lingva vidpunkto: finnoj parolas idiomon ne-hindeŭropan, kaj la svedlingvaj ses procentoj de la loĝantaro ĝuas lingvan demokration. Al la finna literaturo — nepre pli konata por e-istoj ol por aliaj — li omaĝis per citaĵo el “Kongresa runo” de Kalocsay (verkita en 1922 por la UK en Helsinko), kaj li finis per aliteracia alvoko aluda al ĝi:

“vigle kaj veke varbu, por ke venu el Tampere vere vibra verda voko!”

El la podianoj unue parolis la gastigantoj: Jukka Laaksonen, prezidanto de LKK, memorigis ke la “malrapidaj, ĝisfundaj finnoj” preparis la kongreson dum pluraj jaroj; Jukka Pietiläinen, prezidanto de E-Asocio de Finnlando, esperis ke la UK donos pluan elanon al la landa movado. Krom ili, sur la podio sidis Jouko Lindstedt, rektoro de la Internacia Kongresa Universitato;

estraranoj Michela Lipari, John Wells, Mark Fettes, Ulrich Lins kaj Hans Bakker; Danny ten Haaf, vicprezidanto de TEJO; la direktoroj Osmo Buller kaj Simo Milojević.

La celoj de la esperantistoj “bone akordas kun la idealo de la Ĉarto de UN” — konstatis en sia saluto la Alta Protektanto Martti Ahtisaari, prezidento de Finnlando. Li ne povis ĉeesti, sed en la sekva tago delegacio vizitis lin en lia somera rezidejo por transdoni al li la Premion Zamenhof (vd. apude).

Aliaj laŭtlegitaj salutoj venis de Claes Andersson, kultur-ministro, poeto, kaj de tri membroj de la Honora Komitato: Kaarina Suonio, estro de la gubernio Tavastio (Häme), kie Tampere situas; Jarmo Rantanen, ĉefurbestro de Tampere; kaj Johannes, la ortodoksa ĉefepiskopo de Karelio kaj de tuta Finnlando, kiu sendis sian benon. La Honora Komitato lastminute kompletigis per eŭro-parlamentano Erkki Tuomi-Oja kaj Pekka Aikio, prezidanto de la Samea Parlamento.

La inaŭguron ĉeestis la ambasadoroj Moshe Gilboa (Israelo), Kim Nae-sung (Korea Respubliko) kaj Dana Huňátová (Ĉeĥa Respubliko), kiu invitis al la venontjara UK en Prago. Vicambasadoroj Roberto Natali kaj Seán Ó Regan reprezentis Italion, resp. Irlandon, kaj unua sekretario Joanna Trzcíńska-Mejor Pollandon.

En la publiko sidis ankaŭ Pertti Kataja, kiu prezidas la Ligon de Finnaj-Polaj Amikec-societoj, kaj la direktoro de la Eksterlanda Servo de Pola Radio, Jerzy Marek Nowakowski.

Mesaĝo de Unesko

Colin Power, Asista Ĝenerala Direktoro de Unesko pri Edukado

Kun granda plezuro mi varme salutas la kongresanojn. Unesko ĉiam tre alte taksis sian kunlaboron kun internaciaj neregistaraj organizaĵoj, kaj ĝojas pro siaj longdaŭraj rilatoj kun UEA.

Ekde sia lanĉo en 1887, Esperanto signife kontribuis al la reciprokaj kompreno kaj komunikado inter kulturoj, kaj al la valorigo de la lingva diverseco, ĉu temas pri fremdaj lingvoj aŭ la gepatra. Unesko kunstrebas al tiuj celoj.

La temo elektita por ĉi tiu kongreso, “Ni, la popoloj” — unu mondo aŭ disaj eroj?”, tuŝas demandojn interesajn kaj gravajn por Unesko. Neniam pli ol hodiaŭ, sojle de ĝia

propra 50-jariĝo, la misio de Unesko por fortigi la pacon kaj sekurecon per edukado, scienco, kulturo kaj komunikado ŝajnis pli aktuala. Ĉiuj klopodoj starigi kulturon de la paco devas konsideri ne nur la radikojn de interhomaj konfliktoj, sed ankaŭ ĉiujn valorojn kaj rimedojn kiuj antaŭenigas la komunikadon kaj komprenon inter ĉiuj ŝtatoj, popoloj, etnoj, kulturaj kaj religiaj komunumoj.

Unu via iniciato sur tiu kampo, kiun varme bonvenigis Unesko, estas la starigo en 1991 de Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo, Unesko-asocio por esperantistoj kaj aliĝinta faka asocio de UEA. Ni ankaŭ notis kun plezuro la raporton faritan en 1994 por Unesko pri viaj diskutoj dum la 78-a UK en Valencio pri la temo “Edukado por la 21-a jarcento”.

Nome de Unesko, mi salutas ĉiujn partoprenantojn en Tampere kaj deziras al vi plej sukcesan kongreson. ★

Zamenhof-premio al la finna prezidento

Martti Ahtisaari, la prezidento de Finnlando, estas la kvina homo kiu ricevis Premion Zamenhof. Ĉi tiun premion, je la valoro de 1000 usonaj dolaroj, UEA aljuĝas al personoj kiuj elstare antaŭenigis la internaciajn kompreniĝon kaj komunikadon. Ahtisaari estis, dum sia longa kariero ĉe Unuiĝintaj Nacioj, i.a. ties asista ĝenerala sekretario. Li estris mision kiu kuratoris la transiron al demokratio ĉe la sendependiĝo de Namibio (1989-90), kaj li partoprenis kiel UN-sendito la packreaĵn provojn en eks-Jugoslavio (ĝis 1993).

Dum sia dekjara ekzisto, la premio estis jam atribuita al du aliaj eksaj asistaj ĝeneralaj sekretarioj de UN: Robert Mueller kaj Brian Urquhart; al Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala sekretario de Unesko; kaj al James P. Grant, la ĉi-jare mortinta ĝenerala direktoro de UNICEF.

La aljuĝo de la premio estis anoncita en la inaŭguro de la UK. La transdono mem okazis la postan tagon, en la somera rezidejo de la prezidento en Naantali. La delegacio de UEA konsistis el (de maldekstre): LKK-estro Jukka Laaksonen, IKU-rektoro Jouko Lindstedt, kaj UEA-prezidinto John Wells kaj Humphrey Tonkin.



Foto: Aĵuranto de prezidento Ahtisaari

Enmanigante la premion al Ahtisaari, Laaksonen paroladis finne. La ceremonieton sekvis malstreĉa konversacio anglalingva pri UN kaj pri mond-politikaj demandoj. Trinkante sukcon de finnaj fragoj, la gastoj restis kun Martti Ahtisaari 45 minutojn anstataŭ la protokole planita duonhora. ★



Skribe salutis la ambasadoroj de Britio, Germanio, Hungario, Sud-Afriko kaj Usono, la kultur-ministro de Katalunio, kaj la urbestro de la norvegia ĝemelurbo Trondheim.

Post paŭzo por la pianulo de Teresita Alaniz, Mark Fettes voĉlegis saluton de Unesko (vd. maldekstre).

John Roberts, reprezentanto de Mondfederisma Movado (kiu ekde 1977 formale rekonas Esperanton kiel sian oficialan lingvon apud la angla kaj la franca) diris ke la mondfederistoj akceptas la ideon de komuna lingvo, sed ankoraŭ malmultaj lernas Esperanton; aliflanke, nemultaj esperantistoj agas politike.

La salutmesaĝon de Louis C. Zaleski-Zamenhof (vd. p. 146) laŭtlegis Hans Bakker. El la grandnombraj movadaj salutoj aparte menciigis tiuj de Sennacieca Asocio Tutmonda, de William Auld, Grégoire Maertens, kaj de la 92-jara Karl Söderberg (ĉiuj Honoraj Membroj).

La sekva paŭzeto donis okazon al Harri Miettunen por senŝuldiĝi: ludante la sonaton F-maĵoran por tubjo kaj piano de Pergolesi (kun akompano de Jari Salmela), ĉi tiu finna tubjisto kompensis la komplezon de la Centra Oficejo, en kies ĉambro Zamenhof li

regule ekzercis sin dum sia muzikstudado en Roterdamo.

John Wells anoncis kiujn nomojn la Komitato decidis aldoni al la prestiĝa listo de Honoraj Membroj: pri Jorge Abraham (Argentino), Barbara Cvetkova (Rusio), Elfriede Ernst (Belgio), Joachim Giessner (Germanio), Adamo Goralski-Pawlikowski (Kanariaj Insuloj), HAN Moo-Hyup (Koreio), Julius J. Manson (Usono), Hugo Röllinger (Germanio) kaj Eduard V. Tvarožek (Slovakio) ni publikigos biografiajn notojn en oktobro. (La honorigo de Röllinger estis anoncita nur en la Solena Fermo.)

Eĉ la Honora Patrona Komitato, kies konsisto ŝanĝiĝas malofte, riĉiĝis per du elstaraj profesoroj: Nobel-premiito, dumviva membro Reinhard Selten (Germanio), kaj profesoro Humphrey Tonkin (Usono), prezidinto de UEA.

Ni, la homoj

Mark Fettes enkondukis en la kongresan temon per verva kaj faktoriĉa parolado pri la sukcesoj kaj fiaskoj de la 50-jara UN. Li finis ĝin jene: "ni ne pensu ke ni, e-istoj, fakas nur pri la lingva aspekto de internacia kunlaboro... ni estas ankaŭ batalantoj

en pli ĝenerala lukto por valorigo de la homo en la kadro de lingva kaj kultura diverseco." Dum la Ĉarto de UN komenciĝas per la vortoj "ni, la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj", la esperantistoj, kiuj "komprenas, pli bone ol iu ajn alia, la komplikecon de la homa identeco", vortumus similan deklaron nepre ĉi tiel: "Ni, la homoj de la unuiĝonta homaro..."

Malgraŭ tio, bunta aro de kongresanoj viciĝis por saluti, tradicie, nome de sia lando: reprezentigis 51 regnoj. Simo Milojević, kiel kutime, provis ĉiel limigi la kvanton de salutvortoj. Plej elegante gajnis tempon la estonoj: la publiko aprobis ke ili salutu kante! La prezidanto de la najbara Latvia E-Asocio, Māris Jākobsons, rimarkigis ke duono de ties membraro venis al la kongreso (ĉ. 50 el 100): ĉu rekordo en sia speco? Multe aplaŭdiĝis la reprezentanto de Bosnio kaj Hercegovino, Šefik Rizvanović, kaj Terezija Kapista el Jugoslavio, kiu deziris "ion kio ne estas aĉetebla en la libroservo: pacon".

Specialan salutkanton de Mikaelo Bronštejn kantis kaj pianis Elena Puhova. Fine, la kongresanoj streĉe aŭskultis la festparoladon de John Wells (vd. p. 142), kaj solene staris dum la sonoj de "La espero". ★

Estraro el tri mondopartoj

Sesdek kvin membroj de la Komitato de UEA partoprenis en Tampere la kunsidojn, kies plej interesa ero estis la elektado de niaj novaj gvidorganoj.

Ĉar la UK estis granda, ankaŭ la Komitato kunsidis nekutime multnombra. Post elekto de komitatanoj C ĝi havis 77 membrojn, el kiuj do nur unu sepono ne ĉeestis aŭ ne nomis anstataŭanton.

“Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj” (Statuto de UEA, art. 25), la komitatanoj A kaj B rajtas elekti komitatanojn C ĝis la kvarono de sia propra nombro (64). Ke oni ne elektis la maksimumajn 16, sed 13, atestas pri singardemo ne pufigi la Komitaton, sed eble eĉ pli pri manko de interesiĝo ĉe multaj kompetentuloj, kiuj ne vidas en la Komitato sufiĉajn eblojn por serioze labori.

Kvankam la nombro de C-kandidatoj estis negranda, kritikojn rikoltis ke oni elektis ĉiujn proponitojn. Kelkaj membroj trovis tion nedemokratia, ĉar laŭ ili povas temi pri elekto nur kiam estas pli da kandidatoj ol lokoj. Formale ĉio ja iris laŭorde, ĉar ĉiun kandidaton subtenis pli ol la duono de A kaj B. Estas tamen facile kompreni la ĉagreniĝon pri tio ke ĉiu kiu sin anoncis por C-komitataneco, kvazaŭ aŭtomate elektiĝis. La kritikantoj demandis kial tiuj kun tia emo por komitataneco ne kandidatiĝis jam por la B-elektoj.

En la unua baloto pri C voĉdonis 49 komitatanoj. Elektiĝis T. Huĝimoto

(41 voĉoj), B. Despinea (40), J. Bachrich (38), Puramo Chong (38), DAI Songen (37), B. Casini (36), W. F. Huppertz (36), A. Ruyschaert (36) kaj G. Maertens (34). En la dua baloto F. de Geus ricevis 42, F. Witdoeck 37 kaj Z. Tišljari 31 voĉojn el 58. Fine elektiĝis ankaŭ J. Franquesa Solé per 36 el 40 voĉoj.

La Tampereaj elektoj kronis la procezon kiun la diligenta elektokomisiono (W. Harmon, R. Corsetti, T. Huĝimoto) startigis jam du jarojn pli frue, kiam ĝi komencis enketi pri eblaj kandidatoj. Ĉar la Statuto permesas al la prezidanto nur du sinsekvajn mandatojn, en Tampere nova homo devis transpreni la martelon de prof. Wells. Kromaj tri estraranoj ne re-kandidatis. Estis do klare ke la nova Estraro konsistos ĉefe el novaj vizaĝoj.

En la unua kunsido la komisiono prezentis liston laŭ kiu prof. LEE Chong-Yeong estu prezidanto kun M. Fettes, M. Lipari, P. Jegorovas, A. Wandel, W. F. Huppertz kaj R. Lindblom kiel aliaj estraranoj. Al ili devis aldoniĝi unu plia membro. Tiu listo elvokis kritikojn, i.a. ĉar estis nur unu virino en ĝi. La komisionanoj klarigis ke, malgraŭ serĉegado, ili ne trovis pli da estraremaj virinoj, kaj ke ankaŭ pli ĝenerale ili renkontis gran-

dan malemon ĉe multaj kiujn ili volis proponi por estraraneco.

Ĉar la prezidanton oni elektas aparte, en sia dua kunsido la Komitato voĉdonis pri la sola kandidato Lee, kiu ricevis 47 porajn kaj 4 kontraŭajn voĉojn. Sekve kun granda aplaŭdo la komitatanoj bondeziris al la dua azia prezidanto de UEA de post pli ol tri jardekoj.

Intertempe la komisiono ricevis tri pliajn kandidatojn por la Estraro: F. de Geus, R. Triolle kaj Z. Tišljari, dum Lindblom rifuzis kandidati. Retiriĝis ankaŭ Huppertz, kiu estis konsentinta iĝi estrarano pri financo se ne aperos alia kandidato. De Geus estis proponita ĝuste por tiu fako.

Oni decidis ke apud la prezidanto estu ses estraranoj.

En sekreta baloto elektiĝis Fettes (56 voĉoj), Wandel (51), Triolle (50), Lipari (48), de Geus (48) kaj Jegorovas (44). Ne elektita estis Tišljari (19). La nova Estraro estas la plej tutmonda ĝis nun, ĉar el la sep anoj tri estas ne-eŭropaj. Ankaŭ la virinoj sukcesis plifortigi sian reprezentigon al du, el kiuj R. Triolle fariĝis vicprezidanto. Kiel ĝenerala sekretario



Foto: Isván Erti

Saluto de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof

[...] Okazas ke la jaro de la Kongreso, kiu mem estas duoble jubilea — ĉar la 80-a kaj okazanta 90 jarojn post tiu en Bulonj-sur-Mar —, koincidas kun la 50-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj. Ni solene festu tiun jubileon: unuiĝi ja ĉiam estis la alvokvorto de la Esperanto-movado; unuiĝi en konsento, celante krei, laŭ la vortoj de “La espero”, kiujn vi tuj kantos, unu grandan rondon familian de popoloj. Rondon familian ene de kiu disaj eroj unuiĝos por fari unu mondon, riĉan je diverseco de gentoj, de kulturoj, de religioj; ene de kiu, komprenante unu la alian, ĉiuj reciproke estimos la malsamecon de la aliaj.

Grandiozaj taskoj atendas la familion de popoloj ĉe la sojlo de la venonta jarmilo. Ni urĝe devos:

- haltigi la mediodamaĝadon, kiu minacas la estontecon de nia terĝlobo;
- solvi la dramon de la senlaboreco, paradoksan rezulton de mismastrumado de la teknika progreso;
- krei kondiĉojn, por ke la tempo liberigita per la laboro de

aŭtomatoj kontribuu al la feliĉo de la homoj, anstataŭ kaŭzi ilian mizeron;

- trovi ekonomian ekvilibron inter la kontinentoj, por venki la mizeron kaj malsaton, kiuj nun trafas grandan parton de la mondo;
- ĉesigi la konfliktojn tiukaŭzajn; haltigi ĉiujn militojn — inter etnoj, inter nacioj, inter religioj; preventi kontraŭhomarajn krimojn.

Tiuj taskoj (la nekompleta listo donas nur ekzemplojn), eble la noblaj estontaj taskoj de Unuiĝintaj Nacioj, premisas por sia plenumiĝo mondskalan interkonsenton. La Esperanto-movado kontribuu al tiu interkonsento provizante ties instrumenton — la internacian lingvon. Ni ja memoru ke antaŭ kvin (aŭ eble kvindek?) jarmiloj alia grandega tasko ne povis plenumiĝi fare de la tiama Unuopa Nacio, pro ties lingva konfuzo ... Ni do zorgu ke Unuiĝintaj Nacioj ne ripetu la malsukceson de la iamaj konstruantoj de la Babela Turo!

★

reelektiĝis M. Fettes. (Vd. la tasko-dividon de la Estraro en la kolofono; prezento de la estraranoj aperos en venonta numero.)

En Tampere UEA ricevis du pliajn landajn asociojn. Kun Rumana E-Asocio kaj Unuiĝo Togolanda por Esperanto ilia nombro nun estas 56. La decido pri iliaj petoj ne estis problemo, diference de tiu de Kataluna E-Asocio. Ĉar UEA jam havas aliĝintan asocion en Hispanio (Hispana E-Federacio), akcepto de KEA postulus konsenton de HEF aŭ almenaŭ mankon de ĝia kontraŭstaro. Ĉar la peto de KEA venis lastmomente, tia konsento ne povis esti akirita. Laŭ la ĉeestantaj reprezentantoj de HEF, ilia federacio ĉiukaze ne aprobus aliĝon



La tri homoj sen kiuj ne ekzistus la nuna Estraro: Tacuo Huĝimoto, William Harmon kaj Renato Corsetti laboris du jarojn, enketante pri eblaj kandidatoj.

de KEA. Post mallonga diskuto la Komitato konstatis la aferon ne matura por decido kaj resendis ĝin al la koncerna komisiono por plua studado. Dum la semajno okazis diskutoj por trovi taŭgan manieron por ke katalunaj esperantistoj sentu sin reprezentitaj en UEA ankaŭ nun, kiam HEF estas la sola landa asocio en Hispanio. El la diskutoj rezultis ke J. Franquesa Solé, prezidanto de KEA, estis alelektita al la Komitato de UEA kiel C-membro, dum flanke de HEF oni studos la eblojn modifi la statuton de HEF tiel ke ĝi konformu al la nuna federacia karaktero de la lando.

Kontrakton pri kunlaboro la Komitato aprobis kun Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj (OSIEK)

Komitato de UEA por 1995-1998

Konforme al la art. 8 de la Ĝenerala Regularo de UEA, la 16-an de julio 1995 aparta komisiono nombris la voĉojn por la 11 kandidatoj en la elektoj por 8 Komitatanoj B de UEA. Ĝis la limdato (15-a de julio) alvenis entute 1388 voĉdoniloj, el kiuj 1382 validaj. La rezulto estas jena:

H. Bakker (1014 voĉoj), D. Blanke (886), Ph. Chavignon (698), M. Fettes (1144), U. Lins (1028), M. Lipari (923), A. Orellana (840), A. Pettyn (924), Z. Tišljär (714), J.C. Wells (1101), Yamasaki S. (966). Ne estas elektitaj Chavignon, Orellana kaj Tišljär. Sekve, la Komitato de UEA nun konsistas el:

Komitatanoj A: H. P. Adriaanse (NL), T. Bak (DK), M. F. de Bastos (PT), Y. Bellefeuille (CA), M. Belošević (HR; ILEI), R. Corsetti (IT), S. Culbert (US), S. Čolić (BA), Ch. Darbellay (DE), M. Delforge (BE), A. Emanuelsson (SE), K. E. Enderby (AU), Ferenczy I. (HU; UMEA), G. Greatrex (GB), A. Grzębowski (PL; Monda Turismo), Gulyás I. (HU; IFEF), D. ten Haaf (NL; TEJO), W. Harmon (US), J. Hernández (CU), L. E. Hernández (ES), M. Jākobsons (LV), P. Jegorovas (LT), A. Kaljusaar (EE), A. Karvinen (FI; LIBE), S. Kocevski (MAC), V. Kočvara (CZ), A. Korjenkov (RU), L. Kosieniak (PL), E. Kovtonjuk (UA), T. Kvakland (NO), J. Laaksonen (FI), E. Lauper (CH), P. Lécaille (FR; Monda Kunagado), S. Ledon (BR), Lee Chong-Yeong (KR), R. Lindblom (SE), U. Lunde (NO; TEJO), B. Moon (LU), V. Morankić (HR), C. Nourmont (FR), L. Patek (AT), R. Petrović (YU), G. Polerani (IT; IKEF), M. Pontika (GR), K. Popov (BG), Princz O. (HU), E. Schwarzer (DE), C. Stöp-Bowitz (NO; ISAE), Szyzi K. (JP), Takeuti Y. (JP), TAN Xiuzhu (CN), E. Tantin-Ackermann (IT), P. Todorov (BG), R. Triolle (FR), A. Wandel (IL), Yu Tao (CN), J. Zadravec (SI).

Restas nomotaj komitatanoj A por: Argentino, Rumanio, Togolando kaj observantoj.

Komitatanoj B: H. Bakker (NL), D. Blanke (DE), M. Fettes (CA), U. Lins (DE), M. Lipari (IT), A. Pettyn (PL), J.C. Wells (GB), Yamasaki S. (JP).

Komitatanoj C: J. E. Bachrich (YV), B. Casini (IT), P. Chong (KR), Dai Song-en (CN), B. Despiney (FR), J. Franquesa Solé (ES), F. de Geus (NL), T. Huĝimoto (JP), W. F. Huppertz (NL), G. Maertens (BE), A. Ruyschaert (LU), Z. Tišljär (SI), F. Witdoeck (BE).

praktike unuanime, dum tiu kun Esperanto-Rondo de Amikaro Bruno Gröning ne sukcesis: 18 komitatanoj voĉdonis por kaj 4 kontraŭ, sed ĉar 31 sin detenis, la voĉdono estis senrezulta. Laŭ la proceduro oni estus devinta rediskuti kaj revoĉdoni, kion la Komitato ne volis, do la afero revenos en Prago. Evidente tiuj komitatanoj kiuj malakceptas la ideon de la Amikaro pri "kuracado per spirita fortoj", sukcesis heziti siajn kolegojn kaj tiel bloki la akcepton, kvankam la filozofio de kunlaborema organizaĵo devus neniel roli ĉi-rilate.

La diskuto pri la financa farto de UEA ne bezonis multan tempon. La jaro 1994 estis la tria sinsekve kun malkreskanta negativa saldo en la spezokonto. Prognozo pri la evoluo en 1995, same kiel buĝeto por 1996, montris ke tiu tendenco daŭras. Ankaŭ la bilanco 1994 kaj la stato de la plej multaj fondaĵoj konfirmis ke UEA estas ekonomie pli forta ol iam ajn. Tial eblis ne plialtigi la guldenajn kotizojn por 1996, kvankam la inflacio pravigus tion. Tiu decido helpas limigi la plialtigon en tiuj valutoj kies malfortiĝo ja necesigas ĝin.

Akceptiĝis nova kongresa regularo, regularo de Rondo Familia, kaj kelkaj modifoj en la regularoj pri la Serio Oriento-Okcidento kaj pri Belartaj Konkursoj. Post kvarjara diskuto UEA ekhavis ankaŭ regularon pri delegitoj. Ĝia ĉefa novaĵo estas ke ekde nun ankaŭ la delegitojn oni nomas por trijara periodo.

Procedura teatraĵo

Ankaŭ en Tampere la plej utilaj diskutoj en la Komitato okazis en laborgrupoj. En ili mankis la ĉikanado pri proceduraj formalajoj, kiu tro ofte pezis la plenkunsidojn kiam sana prudento gvidus pli taŭge ol ajna regularo. Ĉar tiu fenomeno ripetiĝas jaron post jaro kaj kongreson post kongreso, necesas pripensi kiel nia parlamento povus uzi sian tempon pli ekonomie por vere plenumi sian statutan rolon kiel la gvidanto de la Asocio. En la nuna situacio, kiam mankas tempo en la plenkunsidoj por tuŝi iun ajn seriozan temon de la movada politiko, neeviteble la gvidan rolon transprenas la Estraro kaj la Centra Oficejo.

Osmo Buller

Unu mondo kun disaj eroj

“Ni, la popoloj” — unu mondo aŭ disaj eroj”: post prezento fare de la kongrestema gvidanto, Mark Fettes, ĉi tiuj ambiguaj vortoj estis diskutataj tra la tuta kongresa semajno.

Tiu titolo ŝprucis el la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Ni, la esperantistoj, normale inteligentaj, ne ignoras ke ekzistas unu mondo *kun* disaj eroj, ne unu mondo *aŭ* disaj eroj. Estas la disaj eroj kiuj universale konsistigas la mondon. Ni scias ankaŭ — kaj la psikologoj tion konfirmas — ke la popoloj konsistas el homamasoj kies agadkapablo kaj inteligenteco apenaŭ atingas tiujn de 7-jaraĝa infano. Ĉio plia en la elvolvado de la kongresa temo iĝis nura detalo.

Lunde, d-ro Wim de Smet stiris la subtemon “Vivmedio kaj evoluigo”, kie la “piro-tekniko” de Stefan Maul ĵurnalisme montris la seriozan danĝeron de homoj kiel li, kiu deziras ĉiumatene krakmanĝi piron longe transportitan kaj konservitan per fridigo. Prof. Werner Bormann esprimis la samon pri uzo de propra aŭto, kiu daŭre — sed malpli kaj malpli — konsumas benzinon. Laŭ klasikaj ekonomikistoj el niaj sistemoj, la dis-

volviĝo de ekonomiaj faktoroj povas elsavi la vivmedion. La konkordo de la “verduloj” ne estas unuanima. Gilbert Ledon enkondukis dubojn fronte al la demografia eksplodo, ankaŭ se oni plantas du arbojn post la dehako de unu. Ursula Grattapaglia optimisme bildigis rezultojn el la UN-konferenco pri la vivmedio en Rio-de-Janeiro (1992), kie estis evidente ke la neregistraj organizaĵoj (NRO-j) kapa-

blas ludi pli gravan rolon ol UN mem por la protekto de nia vivmedio. Mark Fettes, cetere, intencas skribi al tiuj NRO-j kiuj tiam akceptis “Etikan engaĝon al tutmonde ekologiaj sinteno kaj konduto”, unu el kies punktoj rilatis al la uzado de E-o.

Marde, Edvige Tantin kunordigis la subtemon pri la konstante famaj homaj rajtoj. Elstaris la juraj analizoj de Ralph Harry kaj Rafaela Urueña pri UN kaj rilate al praktika aplikado de tiuj rajtoj. La granda heroo de la kongreso laŭ ĉiuj aspektoj kaj temoj estis la Sarajevano Šefik Rizvanović, kiu ja ĝustatempe sukcesis alveni ĝis la kongresejo kaj prezentis, laŭ pro-



Postuli logikecon estas utopie

“Lingvopolitiko” estis la ŝlosila vorto de la 18-a Esperantologia Konferenco, kies kvin horoj da referaĵoj plur-punkte ligiĝis al la ĝenerala kongresa temo.

La unuan subtemon, “Aspektoj de la lingvopolitiko en internaciaj organizaĵoj kaj institucioj — historio kaj perspektivo”, enkondukis Mark Fettes. Li emfazis ke internaciaj organizaĵoj (IO-j) estas historie tre freŝdata fenomeno, kaj eĉ pli ĵuse IO-j ekkonsciis pri lingvo kiel pli ol nura instrumento. Tial ne surprizas ke efektiva lingvopolitiko ĝis hodiaŭ mankas ĉe la IO-j, kvankam la postulata demokratieco de la strukturoj en Eŭropa Unio pli kaj pli trudas re-pripenson de la lingva reĝimo almenaŭ en EU.

Pro sia genezo Unuiĝintaj Nacioj restas strukture konservema IO — klarigis Humphrey Tonkin. Tamen, dum en la formalaj aranĝoj de UN oni

insistas pri egalrajteco de la oficialaj lingvoj, malformale la angla gajnas terenon. Grava averto de Tonkin: e-istoj emas insisti ke oni apliku ilian *logikan* solvon al la lingvoproblemo en IO-j (kaj aliloke) — sed *logika* solvo ofte ne estas la solvo plej akceptebla, kaj eble eĉ ne la plej taŭga, en nia mondo esence nelogika. Eĉ: postuli logikecon estas iagrade utopiismo.

Werner Bormann malmaskis la lingvan hierarkion kiu regas, malgraŭ belaj deklaroj, en EU. Ĉiujn oficialajn lingvojn uzas nur Eŭropa Parlamento, la konsilantaro de ŝtatestroj kaj tiu de ministroj. En diversaj eŭropaj instancoj uziĝas malsamaj aroj de laborlingvoj, sed klare superregas la angla, due la franca, sekvataj de la germana

kaj hispana. Apenaŭ rolas la itala kaj la portugala, neniam la aliaj lingvoj.

Sergej Kuznecov priskribis la lingvopolitikon de post-sovetiaj landoj. Post la disfalo de Sovetio la regionaj lingvoj iĝis oficialaj en la koncernaj ŝtatoj. Tio konfuzas kaj timigas ruslingvanojn, kiuj ofte ne konas la lokan lingvon. Diference de EU, kie la lingvoproblemo koncernas unuavice instituciojn, en eks-Sovetio temas pri homaj vivoj kaj sociaj problemoj.

Denove Tonkin kaj Fettes, plus Michael Cwik, prilumis la duan subtemon: “Esperanto kaj komunikado en IO-j: kial malsukceso?”.

Tonkin kaj Fettes skizis la historion de Esperanto ĉe Ligo de Nacioj, UN kaj Unesko. Tonkin atentigis ke gvidantoj de la E-movado tendencas emfazi la proprajn atingojn ĉi-kampe. Necesas tamen ne troigi niajn proprajn sukcesojn, por ne malhelpi kreon de strategio. Pretigante nin por estonta defio, ni studu kaj analizu la lingvan situacion ĉe UN kaj Unesko, eduku la

praj travivaĵoj, kelkajn faktojn pri la relativeco de homaj rajtoj kaj de paco kun milito. Tio estis pli ol sufiĉa por malebligi specifan rezolucion.

Ĵaŭde, Detlev Blanke kaj la koncerna klera stabo en Esperantologia Konferenco facile malkovris la subevoluintecon de nia enmovada Esperanto-politiko (vd. la artikolon ĉi-sube).

Vendrede: Tago de Paco sub gvido de Fettes. Militoj en Ruando (de Smet), en Bosnio (Rizvanović), en Kamboĝo (Heide Otto), eĉ en iama Hiroŝimo (Harry) okupis la tempon. Ni sciis ke la ĉefa celo de UN estas atingi pacon per kolektivaj rimedoj nur en interŝtataj agadoj, ĉar laŭ la ĝisnuna ĉarto la nacia kaj ŝtata suvereneco devas esti respektata. Malgraŭ la negativaj aspektoj, multaj sukcesoj kaj duonsukcesoj estis registritaj ĉe UN koncerne al homaj rajtoj kaj ekonomia evoluo. Detlev Blanke substrekis la reziston de la patrinoj de soldatoj en Ĉeĉenio; feliĉe, individuaj objektado kaj rifuzado al milit-partopreno ne estas novaĵo.

Oficialaj konkludoj fasadas en la kongresa rezolucio (p. 157).

Gilbert Ledon (Brazilo)

homojn pri tiu temo, formulu klaran, adekvatan strategion, kaj interveni laŭ ĝi — sed ĉu ni havas la financajn kaj homajn fortojn por ĉio ĉi?

Esplorante la kaŭzojn de malsukcesoj, Cwik konkludis ke esperantistoj ne interesiĝas pri politiko, kaj politikistoj ne interesiĝas pri Esperanto. Eĉ ofte ne pretas objektivite diskuti pri lingvaj problemoj.

Kvankam la tria subtemo sonis promese ("Strategio por la dua jarcento — survoje al kohera lingvopolitiko de la E-komunumo?"), Detlev Blanke kaj Amri Wandel fakte restigis la aŭskultantojn ĉe tiu demandasigno. Blanke konstatis ke por serioza scienca okupiĝo pri esperantologio mankas diversaj gravaĵoj: faka revuo (provo siatempe estis farita per *Planlingvistiko*), lingvonormiga instanco (la Akademio ne estas unueca), serioza prilaborado de PIV ktp. Ĉu en tia situacio niaj al-eksteraj klopodoj estas realismaj?

Andy Künzli (Svislando)

Atingi la nivelon de "kriza maso"

Intervjuo kun la nova prezidanto de UEA, prof. d-ro LEE Chong-Yeong



Kiam, kiel vi esperantistiĝis?

En 1948 mi trovis malnovan lernolibron kaj memlernis Esperanton. Ekde 1954 mi plulernis de profesoro Hong, unu el la koreaj pioniroj.

Kiajn taskojn vi plenumis ĝis nun en la E-movado?

Mi estis sekretario de Korea Esperanto-Instituto dum 1958-62, vicprezidanto de Korea E-Asocio ekde 1988 kaj ties prezidanto de 1994. Mi estas komitatano A en UEA ekde 1989. En la Loka Kongresa Komitato de la Seula UK mi funkciis kiel ĝenerala sekretario.

Kio instigis vin kandidati por la prezidanteco de UEA?

Mi volis montri al la mondo ke la E-movado estas ne nur eŭropa, sed tutmonda agado.

Kiel rilatas via profesia vivo kaj via E-aktivado?

Mi estas universitata profesoro. Mia profesio faciligas ke mi mem planu la uzon de mia tempo, kaj tio multe helpas mian laboron por Esperanto.

Kiu esperantisto influis vian pensadon?

Nia majstro d-ro L. L. Zamenhof. Por mi Esperanto estas multe pli ol simple lingva komunikilo. La interna ideo entenata en Esperanto, t.e. homaranismo, ege influis mian penson. Mi deziras esti esperantisto ne nur per la kapo sed ankaŭ per la koro.

Kia vi taksas la nunan situacion de la Esperanto-movado kaj specife de UEA?

La mondskala E-movado progresas, malgraŭ la politikaj ŝanĝoj kaj militoj en Orienta Eŭropo. La movado en Azio kreskas bone; ankaŭ en Afriko ni vidas bonan komencon. La lingva problemo de Eŭropa Unio donas al ni bonan ŝancon por pliatentigi internaciajn organizojn pri Esperanto. Sed la maljuniĝo de esperantistoj, speciale

en Eŭropo, ĝenas min. Ni bezonas kontinue kreskantan enfluan de nova sango.

Kiajn gravajn taskojn vi antaŭvidas en la venontaj jaroj por la E-movado; por UEA; por la Estraro de UEA; por vi mem?

Esperanto ne estas hobiaĵo inter E-parolantoj, sed serioza kaj laŭdinda movado de pacamo kaj homamo. La gravaj taskoj estas: plijunigi la esperantistaron, kaj atentigi la ne-Esperantan mondon, speciale internaciajn organizojn, ke praktike eblas — kaj neeviteblas — uzi Esperanton por internacia komunikado kaj paco.

UEA devas pligrandigi sian membronombro en ĉiuj kategorioj — inkluzive aligitajn membrojn de landaj asocioj —, por atingi la nivelon de "kriza maso", post kiu la uzado de Esperanto kreskos laŭ ties elasta forto.

La UEA-Estrararo devas montri konkretan politikon pri la utiligo de E-o, por la agado de landaj kaj fakaj asocioj. Mi esperas ke ĉi tiuj sendos informojn pri siaj faroj al la UEA-Estrararo, por ke la koncernaj estraranoj povu interŝanĝi agad-spertojn kaj kunordigi la mondiskalan agadon.

Mia rolo estas kunordigi la agadon de la estraranoj kaj helpi realigi la aspirojn de Esperantujo.

Ĉu la nuntempa informada revolucio, precipe la tutmondaj komputilaj retoj, estas ŝanco aŭ minaco por Esperanto?

Ĝi donas bonegan ŝancon disvastigi la komunan lingvon Esperanto, kaj montri ĝian praktikan utilecon. Tamen ni bezonas Esperantan version de la necesaj komputilaj programoj. Ilo estas teknike neŭtrala: ĝia utileco dependas de tio kiu uzas la ilon.

Ĉu Esperanto portas en si iun idean mesaĝon?

Ĝi portas la mesaĝon de neŭtraleco, egaleco, amikeco kaj justeco, surbaze de homama ideo. La lingvaj rajtoj de lingve malfortaj nacioj devas esti protektataj, kaj Esperanto estas bona protekta ŝildo por ili. ★

UN-modelo: ĉu tro fidela?

La Modela Asembleo de UN denove pruvis ke Esperanto taŭgas kiel altnivela diskutilo pri mondo-problemoj.

Po unu aŭ du esperantistoj el 23 landoj, plejparte junaj, rezignis pri la merkredaj ekskursoj por pridebati dum sep horoj “rezoluciojn pri la situacio de minoritatoj”. Kongresanoj el Argentino, Aŭstrio, Belgio, Bosnio-Hercegovino, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉinio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Israelo, Japanio, Kanado, Koreio, Kostariko, Kroatio, Norvegio, Pollando kaj Svedio subite transformiĝis en rafinajn diplomatojn.

Principe, ĉiu asembleano devis reprezentinti la vidpunktojn kaj interesojn

instancoj por minoritatoj? ... kaj tiel longe plu.

Dum la debato ĉe kelkaj kreskis frustrigo. Ĉu esperantistoj, sen lingva baro, ne kapablos veni al interkonsento? Bruno Masala (Francio) lanĉis trafan frazon: “ni sufiĉe kapablas esprimi nin [en Esperanto], sed ne sufiĉe aŭskulti unu la alian”. Tuj venis la kontraŭ-argumento: ni ĉi tie ne agas kiel esperantistoj, sed klopodas fidele modeli UN-sembleon!

La proponita rezolucio estis dissekita, modifita, reduktita ... Fine, kiam okazis la voĉdono pri la kom-



Alparolas Wojciech Soczówka (Pollando). Aŭskultas (de maldekstre): Ralph Harry, Geoffrey Greatrex, Anna Ritamäki, André Ruyschaert.

de sia ŝtato, eĉ spite al siaj personaj opinioj. Sub la sekretaria gvidado de André Ruyschaert, la plejmulto mirinde sukcesis en tiu rolludo! Facilas do imagi ke la rezoluci-propono malkatenis pasiajn diskutojn pri demandoj kiel: Ĉu ĉiu rajtu mem difini sin kiel anon de iu minoritato? Ĉu ŝtatoj garantiu al ĉiu la rajton lerni per sia gepatra lingvo en lernejo? Ĉu oni favoru starigon de lokaj memregaj

promisa restaĵo, nur 7 delegitoj voĉis por, dum 12 malakceptis! Tial la tago fermiĝis sen videbla rezulto. Tamen, la organizantoj (Geoffrey Greatrex kaj Anna Ritamäki) kontentis: la seriozeco de la aranĝo rekomendas ke oni re kaj kaj re okazigu ĝin. Krome, kiu scias: inter la partoprenantoj eble jam provadis siajn fortojn, laŭ la enkondukaj vortoj de eksdiplomato Ralph Harry, “iu nova Hodler aŭ Privat”. ★

Estraro de TEJO 1995-97

Dum la 51-a Internacia Junulara Kongreso en Sankt-Peterburgo estis elektita nova estraro de TEJO.

Prezidanto: Danny ten Haaf, Nederlando

Vicprezidantoj: Jorg de Mulder, Belgio (landa agado); Jimmy Stryhn Meyer, Danio (eksteraj rilatoj)

Ĝenerala sekretario: Jeroen Balkenende, Nederlando

Kasisto: Marion Grosjean, Svislando

Estraranoj: Miquel Gómez i Besós, Hispanio/Germanio (Eŭropa Junulara Oficejo); Saskia Idzerda, Nederlando (kongresoj, KER-seminarioj); James Rezende Piton, Brazilo (informado, Latin-Ameriko).

Fari notojn konsilindas

Ĉekomence, profesoro Wells prezentis profesoron Jouko Lindstedt, la rektoron: probable ĉar tiu ĉi, estante la unua preleganto, ne povis ludi duoblan rolon. Poste Lindstedt, kvankam li sidis en la plej antaŭa seĝvico sur la planko inter ordinaruloj, certe montris sin aŭtoritata: krom la kutima prezento de la prelegantoj, li vigligis la diskutojn kiam la aŭskultantoj malmulte — aŭ tute ne — faris demandojn al la preleginto.

La rektoro en sia enkonduko tre trafe emfazis ke la universitatoj havas la devon, krom alparoli siajn kolegojn, popularigi la sciencojn. La celo de IKU estas ĝuste tio. Cetere, la plejparto de la memuaroj en Esperanto ja estas popularigaj, ĉar — pro la feroce konkurenco en la scienco — siajn originalajn ideojn la esperantistoj-sciencistoj publikigas ĉefe en fakaj periodaĵoj redaktataj en “grandaj” lingvoj (nuntempe precipe en la angla).

Prof. Helmar Frank, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj

AISIKU unuafoje

La ĉi-jara IKU provis novaĵon: AIS agnoskis la tuton de la IKU-lekcioj kiel prelegserion de AIS-studadsesio. AIS ankaŭ kontribuis per du ok-horaj kursoj: komputika de M. La Torre kaj astronomia-astrofizika de H. M. Maitzen kaj A. Wandel. Studentoj de AIS povis akiri po unu studunuon per plejparta aŭskultado de la IKU-lekcioj kaj per partopreno en unu el la AIS-kursoj, kiuj finiĝis per ekzamenoj.

La Torre enkondukis ne al komputiluzo, sed al pli vasta komputoscienco, aŭ komputiko, aro de fakoj kaj teknikoj specife aplikeblaj je la traktado — precipe aŭtomata — de informoj.

Sed kiajn problemojn traktas komputiko? Kiel efike uzi la unuan tute ĝeneral-celan aparaton kiun la homaro posedas? Tio dependas de la kondiĉoj (al la problemoj de malsato oni malsame reagas en fora fruktarbejo ol en urba vendejo) kaj de la precizeco de la problemoj (ludenigmoj en magazinoj



IKU = Internacia Kongresa Universitato. Aŭ: Iuj Kafeje Umadis.

San Marino (AIS) eksplikis la signifon de la unua kunlaboro inter IKU kaj AIS (vd. ĉi-sube). Post tio komenciĝis la prelegaro mem, per “La deveno de la slavoĵ” de prof. Lindstedt.

Strange ke apenaŭ iu penis pri not-farado. Tio surprizis min, malnovtipan eksstudenton el antaŭdiluva epoko kiam nek aŭdvidaj aparatoj estis utiligataj nek eĉ resumoj estis distribuataj, kaj lernantoj nur skribis en sia kajero. Fari notojn ŝajnas plu konsilinde en IKU, ĉar resumojn oni ne donis, nur

vendis antaŭ la fino de la prelego. La kialon mi ne konas: Ĉu temas pri eŭropa kutimo, diference de la usona maniero malavare proponi resumfoliojn? Aŭ ĉu timas iuj lektoroj kiuj nur laŭlegas el sia manuskripto?

Por laikoj, la prelegoj estis tre interesaj, sed laiko ne scias ĉu ili estis ĉiuj fakaj, altlernej-nivelaj. Ĉu hazarde la nunaj universitatoj, kiuj apartenas al amas-kulturo, tenas malsimilajn kriteriojn ol la antikvaj por-elitaj?

YAMASAKI Seikō (Japanio)

estas klaraj kaj solveblaj, dum nia kara monda lingvoproblemo tute nebulas). Krome, la problemhavo ofte ne scias kio entute eblas, kaj kiom komplika (=kosta) povus esti la solvo. Necesas do unue analizi kaj akurate difini la problemon; poste pluraj ŝtupoj kondukas al la trovo de solva procedo kaj, fine, ties plenumado.

La prelegoj de La Torre estis por fakistoj kaptivaj, dum ankaŭ nefakuloj povis bone sekvi la ĉefan fadenon.

Maitzen kaj Wandel egale dividis inter si ok horojn: po unu horon da prelegado kadre de IKU sekvis po 3 horoj da universitat-nivela kurso — en salono kiu laŭ vasteco pli similis al gimnazia klasĉambro ol al aŭditorio. Maitzen parolis pri la praktikaj flankoj de la astroscienco, nome pri teleskopoj, pri observado kaj mezurado de kosmaj fenomenoj kaj distancoj; Wandel prelegis teorie, pri la evoluo de la tuta kosmo kaj de la unuopaj steloj.

Daniel Pfeiffer (Germanio)

kaj Antoine J. Mechelynck (Belgio)

Spuristo spurita

Profesoro KOBAYASI Tsukasa prezentis, tre klare kaj interese, psikantran hipotezon, verŝajne plejparte laŭ Freŭda skolo, pri “Kial la aŭtoro A.C. Doyle malamis sian kreitan detektivon Sherlock Holmes?”. Kobayasi opinias ke tra pluraj el la Holmes-noveloj kaj -romanoj oni povas spuri kamuflitajn aludojn al la supozita adulto de la patrino, Mary Doyle, kies edzo sin detruis per alkoholismo; kaj iasence Holmes venkis kaj “mortigis” tiun patrinon, maskitan kiel ia Mary aŭ eĉ M-a-r-y-enhava Moriarty. La sentoj de Doyle pri la patrino kaj do pri Holmes estis tre ambiguaj.

Unu prelego devis limiĝi al tiu unuola faktoro en vivo kaj kreaĵ procedoj sendube tre kompleksaj. El la atentotenaj argumentoj eble elstaris, implice, la kuraĝo de Arthur Conan Doyle, kiu malgraŭ suferiga, perpleksiga familia situacio verkis tiom, kaj tiel bone.

Marjorie Boulton (Britio)

Ĉu (mal)tro?

La publikan kunsidon de la Akademio de Esperanto ĉeestis ne malpli ol 12 el la 45 membroj de la Akademio.

Regalis nin per siaj saĝo kaj spertoj akademianoj Balbin, Berveling, Bormann, Boulton, Eichholz, Kiselman, Pettyn, Støp-Bowitz, Tonkin, Wandel, Wells kaj Yamasaki.

Ĉiuj akademianoj prezentis sin mem kaj siajn Esperantajn agadkampojn. Poste Wandel faris prelegeton pri lingvopolitiko kaj la rolo de la Akademio rilate al la vivanta lingvouzo kun ties slango, neologismoj kaj ne-ortodoksaj formoj: Ĉu la Akademio faras tro aŭ maltro? Laŭ Wandel la Akademio estonte devus pli direkti la evoluon, kaj malpli kontraŭbatali ĝin. Li ankaŭ atentigis pri mankoj en la familia ĵargono. Bormann komentis menciante similan mankon ĉe nomoj de eŭropaj instancoj kiel Konsilio de Eŭropo/Eŭropa Konsilio.

Sekvis tradicia programero, demandoj de la aŭskultantoj al la akademianoj. Kiel ofte okazis antaŭe, la akademianoj mem provis levi la diskuton al pli principa, pli ĝenerala, pli grava nivelo, dum la demandoj de la publiko ofte tuŝis teknikajn detaletojn. La respondoj de la akademianoj ja estis nur opinioj de unuopuloj, sed estis kiel ĉiam interesaj kaj atentindaj. Kiel oni povis antaŭvidi, leviĝis la demando de landonomoj, eĉ plurfoje. Alia grava temo estis la nun daŭranta reviziado de *Plena Ilustrita Vortaro*.

La diskutoj okazis en bona etoso, montrante la vivecon kaj de la Esperanta Akademio kaj de la Esperantaj lingvo kaj lingvokomunumo.

Bertilo Wennergren (Svedio)

Ago-tagu kunage!

Elpaŝu publike por Esperanto en la Ago-tagu, la 7-an de oktobro, sabate! Kaptu la atenton de la amaskomunikiloj per iu interesa evento, ligita al originala mesaĝo! UEA rekomendas ke tiu mesaĝo rilatu al la 50-jariĝo de UN, kiun oni festos aparte, la 24-an de oktobro. Utila artikolo ĉi-teme aperis en majo (p. 88).

Kaj komencis kune kanti . . .

La finna epopeo Kalevala, kiu furoris en la kongresa Libroservo, pentras la etoson de la Nacia Vespero: se la finnoj, laŭŝajne malvarmaj kaj distancemaj, "reciproke sin renkontas", ili facile pretas al amuzo kaj amuziĝo:

Kara frato, koramiko,
kamarado kunkreskinta!
Venu kaj komencu kanti,
kune nun kun mi recitu,
kiam ni de du direktoj
reciproke nin renkontis.

Ankaŭ la spritaj programgvidantoj Terttu Tyynelä kaj Jorma Ahomäki plurfoje citis el Kalevala. Post serio de lumbildoj pri la multvizaĝa lando, ili anoncis la Turkuan Societon de Klasika kaj Distra Muziko, kiu ludis festan marŝon de Erkki Melartin. La ĉambra koruso Camena kantis finne, svede kaj Esperante "Somertago en Kangasala" de Gabriel Linsén. Serenado de la ebrulo Pentti kaj aliaj popolkantoj eble memorigis al la spektantoj la antaŭjuĝon pri drinkemo de finnoj . . .



Danci estas ago kun rezulto: la dancistinoj de Mirku Flika montras sian dance faritan punton.

Sed kiaj fakte estas la finnoj? Ĝustamomente ni eksciis tion el sprita prelegeto de Terttu Tyynelä. Laŭ ŝi, ili estas iom singardaj rilate fremdulojn, silentemaj, hezitaj en komunikado. Sed ili kapablas primoki sin mem — kion pruvis la frazoj mem de Tyynelä.

El muzika segilo (!) Vilho Manninen

sorĉis transmondajn sonojn; la pecojn "Dimanĉo" (Martti Turunen) kaj "Nokturno" (Hietanen-Wessling) akompanis akordione e-isto Lauri Liukkonen (fakdelegito pri muziko).

Ĉu oni povas "danci punton"? La lasta ero de la unua parto montris ke tio ne estas absurdaĵo: la virina grupo Mirku Flika el Raŭmo per sia komplika danco plektis fadenegojn ĉirkaŭ stangoj . . . ĝis elfariĝis vera punto!

Post paŭzo kaj novaj dia-pozitivoj, finnaj citroj, *kanteloj*, ludis melodiojn pri somer-vespero. La kantela ensemblo akompanis solkanton laŭ la improviza kantmaniero de sameoj. Poste Tampereaj gimnastinoj grize-blue vestitaj fakte ne gimnastikis, sed kvazaŭ baletis, vibre-onde vidigante la akvofalon Pankakoski, laŭ muzikaĵo de Heino Kaski. Post ilia gracio, la popoldanco de la trupo Kantavarvas ŝajnis simplapaŝa, sed ĉarma.

Fine, Tyynelä kaj Ahomäki aliteraciis Kalevala-stile. "Kantu kune kun koruso" — ili alvokis la publikon aliĝi al kantado de "Sur la ponto ĉe Tammer-fluo", kies teksto estis al ĉiuj disdonita, laŭ la zorgemo nacie karakteriza al finnoj. *ie*

Sorĉis verdaj vortoj

Kia estis la Internacia Vespero? Objektive: ĝi konsistis el dek kvin programeroj, en kiuj partoprenis artistoj el dek landoj. Kaj subjektive:

Mi demandis kelkajn spektantojn pri ilia impresoj. Laŭ iuj, tiaj prezentadoj estas ofte memsimilaj kaj ripetigemaj. Aliaj plenditis ĉar plejmulto el la artistoj estis ruslandanoj, aŭ ĉar oni permesis kanton en la uzbeklingvo. Tamen, oni ĝenerale opiniis la Vesperon tre altkvalita kaj la partoprenantojn profesiaj — escepte, kompreneble, de la infankongresanoj, kiuj kompanse ĉarme aktoris en kelkaj skeĉoj. Ilia porokaza ensemblo eĉ ludis ragtimon de Joplin.

La 15-jariĝanta Internacia Ĥoro, sub la reĝisorado de Dimitar Terziev, regalis nin per belaj kantoj.

Poezion ni aŭdis de Carlos Alberto, de Mikaelo Bronŝtejn, kiu belsone kaj belritme recitis onomatopean poemon;

kaj de Vida Jerman, kiu kortuŝis la plej romantikajn per poemo pri virinaj sentoj je foresto de amato.

Majstreco evidentiĝis ĉe la pianludado de Teresita Alaniz (Guastavino: "Paseroj"). Galina Staneŝnikova kantis muzikigon de la Zamenhofa "Preĝo sub la verda standardo" fare de la italo Aldo Fiorentini, kiu akompanis ŝin piane. Elena Puhova prezentis la jam aŭditan "Reva vojaĝo" kaj sian plej novan verkon: "Kanto pri Finnlando kaj Esperanto". La harmonie modulita voĉo de Arimantas Raĉkauskas plenumis du Brahmskantojn (pianis Martina Gazdek).

Folklorgrupo el Koreio buntigis la vesperon per soloa bekflutado kaj samtempa delikata danco.

Vigla kaj ekscitoplana estis la kantado de Ĵak le Puil, profunda kaj sentema tiu de Julián Hernández. Familio Mirzabajev, ensemblo el Uzbekio, bone reprezentis la tiean folkloron. Virtuozo de akordiono, Aleksandr Danjko, ludis Rossini-an arion de Figaro sole per sia instrumento. Esperanto-Teatro el Sankt-Peterburgo distris per fragmento de la teatraĵo *Eksterordinara vojaĝo por du pianoj kaj fluto*.

Finan punkton metis la litovia Asorti, triopa familia trupo (vd. p. 153).

Plej aplaŭdataj tamen estis tiuj eroj en kiuj la vorto "Esperanto" iel aperis — sendepende de arta valoro. Estus preferindaj verkoj en kiuj oni uzas la lingvon kiel esprimilon de sentoj kaj ideoj — sed ŝajnas ke verdaj vortoj sorĉas multajn membrojn el nia anaro.

*Ana Manero (Hispanio)
kaj Perlo Miela (Hungario)*

Esperkantoj dumkongresaj

En la hejmlando de Sibelius, la muzika programo ne povis esti malriĉa. Jen panorama recenzo pri la UK-konzertoj.

Jam la Solenan Inaŭguron agrable kolorigis muzikaĵoj inter la parolaj partoj. Unue ni aŭdis la virtuoza pianon-konzertistinon **Teresita Alaniz** (Argentino), kiu ludas energie, akra-ritme, tamen kun larĝaj melodi-linioj. Ŝian brilan interpretadon oni povis ĝui dum du plenaj koncertoj en

neperfektaĵoj. Post la koncerto, en la vestiblo, la ensemblo zorgis pri kanon-kantado kaj rond-dancado por ĉiuj.

Inter la du "kajtaĵoj" ŝatantoj de melankoliaj kantoj povis aŭskulti la bone konatan duopon **Ĵomart kaj Nataŝa** (Kazaĥio/Svedio), kiuj ludas nur proprajn kantojn kun gitara akom-



La brazila familia ensemblo **Encanto da Terra** kaj la esperantistoj malkovris unu la alian en Tampere.

la kongresa semajno. Due, surprizis aŭskulti muzikilon ĝenerale ludatan nur en orkestro: **Harri Miettunen**, majstro de la plej granda latun-instrumento, la tubjo, rikoltis abundan aplaŭdon per sonato de Pergolesi.

Samtage koncertis unuafoje la ŝatata franca kanzonisto-komponisto **Jak Le Puil**. Kiel ĉe la iamaj bardoj, pli gravas ĉe li tekstoj ol muziko; dumkoncerte li konstante interagis kun la publiko.

Prezentiĝis simpatia rusa duopo: **Elena Puhova**, kiu profesie komponas, kantas kaj pianas, kaj **Mikaelo Bronŝtejn**, ĉi-foje tradukisto kaj deklamanto de rusaj poemoj. Puhova karakterizas bela kantvoĉo, impona pianludado, aminda personeco — ŝi atentis nur pri pli klara prononco.

Dum la koncerto de la populara ensemblo **Kajto** (Nederlando) la salono plenplenis de reprezentantoj de ĉi aĝgrupo. La kvaropo regas multajn instrumentojn, ludas diverstipajn kantojn. Plaĉa la muzika prilaboro, spritaj la tekstoj — kvankam foje prozodie

pano kaj bekflutaj interludoj. Ilia stilo bezonas trankvilan, silenteman etoson.

Por la ekskursita tago anonciĝis du eksterprogramaĵoj: la sveda rokbanda **Persone** (p. 154), kaj "koncerto de Gabija kaj Mieczysław", kiu montriĝis prezentaĵo filozofia-literatura-muzika. **Gabija Vileniškienė** (litova aktorino kaj poetino) kaj **Mieczysław Litwiński** (pola komponisto-kantisto-pianisto) eklernis Esperanton nur antaŭ kvar monatoj, sed ili tre impone komunikas. Ilia spektaklo temas pri: "Tuta mondo — nur mallarĝa ponto. Vojaĝo de vorto kaj sono al saĝo de la vivo. Spektaklo en diversaj lingvoj... kiujn unuigas Esperanto. Fragmentoj el Libro de Saĝo, poezio ekde profunda antikveco ĝis niaj tagoj." Se la plenumantoj estus povintaj aliĝi ĝustatempe, tiu prezentaĵo nepre okupus — laŭ siaj temoj kaj profesia realigo — elstaran lokon en la oficiala arta programo.

Ankaŭ la brazila **Encanto da Terra** ("Sorĉo de la Tero") ekokupiĝis pri E-o antaŭ kelkaj monatoj. Kadre de

eŭropa turneo, la anoj de la familio de Castro koncertas en naŭ lingvoj, kaj lastatempe finas ĉiun koncerton per la odo "Al la ĝojo" de Betoveno en E-o. La patro, Adelmo, instruas siajn gefilojn pri muziko, kaj ĉiuj kvar familianoj ludas plurajn instrumentojn. La publiko senfine aplaŭdis al la bonegaj muzikistoj, ĝuante ankaŭ operariojn prezentitajn de la 13-jara Lys.

En la gitara, solkanta koncerto de **Mikaelo Bronŝtejn** ni aŭdis finnan kanton pri aŭtuno, baladon, kanzonon franceskan pri Johana d'Arko, kabaretkanzonon movadan...

Poste sekvis horo de la **Internacia Ĥoro**, festanta sian 15-an datrevenon. Kiel kutime, **prof. Dimitr Terziev** estris la kantadon de 46 virinoj kaj 10 viroj, kun brila piana akompano de **Martina Gazdek**. Malgraŭ la relativa malmulteco de viroj, la tono sonis egalvoĉe ankaŭ ĉe verkoj por gea koruso. Koruso la kunpublika kantado de "La iamo longe for", post prezento de la "veteranoj" — la kunfondintoj de la ĥoro. Ni ĝuis kantojn finnan, havajan, sudafrikan, propran verkon de la ĥorestro, "Triumfa kanto" de Händel, odo "Al la ĝojo" de Betoveno. Fine la tuta koruso kantis al ni "Ĝis revido".

Perlo Miela (Hungario)

Ĵetu la ritmomaŝinon

Kiam Asorti marŝis al la scenejo ludante litovan popolmelodion, mi ĝojplene antaŭvidis programon de tradicia muziko de balta regiono. Sed ili tuj ŝanĝis stilon al naŭva popmuziko, diversaj kantoj kiuj montris nesufiĉajn distingojn inter si. Malfeliĉe, diabla ritmomaŝino estris ĉion kaj detruis multe da nuancoj homaj.

La fiera patro Edvardas ludis gitaron, dum la patrino Elena vagadis inter piano, fluto kaj akordiono. Ilia ĉarmega dekjara filo Edgaras violonas kiel juna majstro. Tiu knabo jam estas stelo, sed lia talento plejparte malŝpariĝas pro la elektita muziko. Mi esperas ke ili forĵetos la ritmomaŝinon kaj trovos pli taŭgajn kantojn.

Miko Sloper (Usono)

Spektaklaj solludoj

Jadwiga Gibczyńska el Pollando trifoje prezentis al ni unupersonan spektaklon.

Je la unua fojo, ŝi ludis en ĉirkaŭaĵo neniel adaptita: en angulo de la libroservo, Gibczyńska arigis duoncenton da homoj por kunpreni ilin al Sarajevo (*Rakontoj pri Sarajeva sieĝo*). Per plej simplaj rimedoj (kaptuketo, ĉapeto, viŝtuko...) ŝi plurfoje fariĝis alia persono. Ŝi rakontis, ŝi suferis, ŝi sentigis al ni kio estas milito, perforto, frenezo naciisma.

En alia tago, antaŭ amfiteatre sidanta publiko, Gibczyńska denove sol-ludis sinsekve plurajn personojn en la spektaklo *Zamenhof*, kiun ŝi mem kompilis. Entute: bona prezento, kiu sursceniĝis en Tampere ĝuste por la jubilea centa fojo.

Je la tria fojo, denove alia mondo: la absurda universo de la pola Sławomir Mrożek. En *Tiu, kiu falas* — laŭ la tradukinto, Tyburcjusz Tyblewski — “dum iu giganta katastrofo ĉio falas abismen — la homoj, la bestoj, la objektoj... Oni povas atribui al [la teatraĵo] diversajn metaforojn.” Efektive, post la vivofakta konkretco de la antaŭaj spektakloj, ĉi tiu prezento efikis per la riĉeco de interpret-ebloj.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Persone distris energie


La ĉi-jara gajninto en branĉo “Kanto” de Belartaj Konkursoj unuafoje spertis Esperantan rok-koncerton en Tampere.

Sporthalo da gejunuloj (kaj multaj ne tiel junaj!) klare ĝuis la prezenton de la sveda triopo, kiu energie distris la aŭskultantaron dum preskaŭ du horoj — multaj dancis tutkoncerte! Tute profesinivele, ili “vojaĝis” de viglo al mildo, ludante malfacilajn, neregulajn ritmojn rekte apud tute danceblaj popmuzikaĵoj. (En la kantoj, verkitaj ĉefe de Martin Wiese, la influo de la irlanda kvaropo U2 estis

ofte klara.) Malpli sukcesa estis la sonkvalito — sendube pro la sonmiksisto. Multfoje la voĉo de Wiese luktis kontraŭ la laŭtaj instrumentoj, malkomprenebligante la kantvortojn. Plejparte la kuno de la tri Persone-aj voĉoj tamen trafis harmonie kaj efike.

La planoj de Persone inkluzivas akustikan, “senelektran” ludadon, tute aliaŝtile. Plu roku, Persone!

David Gaines (Usono)



Persone: Martin Wiese (gitaro, voĉo; nevidebla); Anders Grop (basgitaro, voĉo; maldekstre); Bertilo Wennergren (perkuŝiloj; dekstre, fone).

Foto: François Veuthey

Luksaĵoj kiajn malhavas multaj lingvoj

En la 90-minuta programero “Libroj de la jaro” Michela Lipari — ĵusa kaj plua estraranino pri kulturo — devis severe polici la svarmantajn eldonistojn, kiuj disponis nur po kvin minutojn por reklami sian freŝan varon al legema publiko.

Temis pri tia abundo ke ni eĉ ne povos citi ĉiujn titolojn ĉi-sekve — atentu la ĉi-apudan kaj venontajn rubrikojn “Laste aperis”.

La unuaj parolantoj “reklamis” ion el kio ni ĉiuj plej pure profitas: kiel jam en nia revuo (majo, p. 91), Wera kaj Detlev Blanke alvokis subteni la gigantan eldonlaboron de Ludovikito.

La vicon de efektivaj eldonistoj malfermis Gerrit Berveling (Nederlando), kies unupersona VoKo abunde

produktas titolojn: plej atentindas *Invit’ al Ĉinesko*, per kiu la poeto Lu Jixin invitas Esperantajn kolegojn al verkado laŭ la klasika ĉina skemo “Ci-o”.


Laŭ Paul Peeraerts (Flandra E-Ligo) oni ofte supozas ke FEL eldonas nur poezion. Efektive, FEL ĵus lanĉis tiukampe *El sisma zono* de Mikaelo Giŝpling kaj *Plena poemaro* de Eŭgeno Miĥalski, klasikulo de la Esperanta moderno; tamen, Peeraerts kunportis ankaŭ la freŝajn *Humuro laŭ la skota*

maniero (anekdotaro de Andrzej Pet-tyn) kaj *Proponaro por la Esperanto-informado* de Marcus Sikosek.

Probable la plej mirinda libro de la nuna rikolto venas de Ĉina E-Ligo. La 624-paĝa *Mirrakontoj de Liaozhai* (trad. Laŭlum) estas socia panoramo el la 18-a jarcento, daŭre populara legaĵo, unu el la kolonoj de la ĉina literaturo. Ĝi estas ornamenta de 35 klasik-stilaj ilustraĵoj.

Gesinoroj Chrdle de KAVA-Pech (Ĉeĥio) uzis po 30 sekundojn por montri siajn lastatempajn eldonaĵojn: ne eblis alie, ĉar temis pri tuta deko! La monografio *La latina kiel interlingvo* de Věra Barandovská, *Espe-*

Laste aperis



DIVERSAĴOJ

Vidbendo: Mazi en Gondolando. Wendy Harris. Esperantigis Roman Dobrzyński, Mila v.d. Horst-Kolińska, Stefan MacGill, Andrzej Pettyn. Den Haag: IEI/Tommy, 1995. Du vidbendoj PAL aŭ NTSC (180 min.), unu sonkasado, unu libro (159 p, ISBN 83-85677-35-6). Intergeneracia kurso de Esperanto por infanoj, junuloj kaj plenaĝuloj. 189,00 gld.

Dezerto de la Tataroj, La (1945). Dino Buzzati (1906-1972). El la itala trad. Daniele Mistretta. Pisa: Edistudio, 1994. 172p. ISBN 88-7036-058-X. 22cm. Bind. Alegoria romano: oficio en fortikaĵo senfine atendadas ke okazu io vere vivinda. 27,00 gld.

Japana Esearo n-ro 2. Div. aŭtoroj. Tokyo: Libroteko Tokio, 1995. 77p. 21cm. Dek du japanaj aŭtoroj eseas pri temoj esperantismaj kaj aliaj. 17,40 gld.

Klera edzino (1944). Upendronath Gangopaddhae (1881-1960). El la bengala trad. Probal Daşgupto. Pisa: Edistudio, 1995. 182p. ISBN 88-7036-047-4. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 29. Romano pri la rilato de viro al edzino pli klera ol li, en la Bharato de la 20-aj jaroj. 27,00 gld.

Komputika leksikono. Sergio Pokrovskij (1949). Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. 365p. 20cm. Bind. Enciklopedia vortaro pri informadiko, kun difino kaj angla ekvivalento por 1960 terminoj Esperantaj + 2020 anglaj terminoj kun Esperanta traduko. 36,00 gld.

Korpo de la homo, La. Enkonduko al konstruo kaj funkcio. Harald Schicke (1953). Buchholz: MZ, 1995 (2-a pliampleksigita eld.). 148p. ISBN 3-89240-098-9. 21cm. Populara anatomio kaj fiziologio. Abunde ilustrita. 32,10 gld.

Kunularo de l' Ringo, La. La unua parto de "La Mastro de l' Ringoj". John R. R. Tolkien (1892-1973). El la angla trad. William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. 543p. 20cm. Bind. Epopeeca rakontego pri imagita universo: la heroo devas detrui magian ringon, kies ekzisto minacas la tutan mondon. 48,00 gld.

Proponaro por la Esperanto-informado. Marcus Sikosek (1973). Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995. 66p. ISBN 90-71205-61-4. 21cm. Rekomendoj pri enhavaj demandoj de nia informado. 5,10 gld.

Receptaro de kuracaj plantoj. Nikola Donev (1914). Buchholz: MZ, 1995. 64p. ISBN 3-89240-086-5. 21cm. Enciklopedieto de 67 plantoj kaj ties kombinaĵoj. 15,60 gld.



Edistudio lanĉis en Tampere tri samformatajn, samprezajn, same valorajn librojn.

Rondo familia, La. Sociologiaj esploroj en Esperantio. Nikola Rašić (1957). Pisa: Edistudio, 1994. 192p. ISBN 88-7036-062-8. 22cm. Bind. Prezento de la ĝisnunaj empiriaj esploroj pri la E-komunumo, i.a. de propra enketo en 1985. 27,00 gld.

Sanon! Kuracu vin mem per naturaj metodoj. Jaime Scolnik (1908). Buchholz: MZ, 1995. 318p. ISBN 3-89240-087-3. 21cm. Kiel eviti malsanojn kaj kiel kuraci ilin per naturaj metodoj kaj terapioj. 52,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

ranto-ĉeĥa vortaro kaj ĉeĥa gramatiketo de Kraft kaj Malovec, plus diverstemaj broŝuroj, ĉiuj imponis ankaŭ per sia moderna dezajno.

Kontraste, ĵak Le Puil (*La Kancerkliniko*, Francio) ne devis hasti prezentante la kutiman literaturan kronnumeron de sia revuo: la tempo sufiĉis eĉ por laŭtlegi el la versa teatraĵo *La orelingo* de Jopetro Danvy, kiun komplementas la poemaro *Ŝimstatoj*.

Libroteko Tokio festis pasintjare sian dekjarigon per *Japana esearo*. En 1995 ĝin sekvis dua esearo japana.

Impeto el Moskvo impetis en 1994-95: ĉe ges-roj Ŝevĉenko aperis la romano *Nesto de viperoj* de István Némere, *SEJM* (historia skizo pri Sovetia E-ista Junulara Movado) de Dmitrij Cibulevskij, kantaro de Mikaelo Bronŝtein, *Plejo*, poemaro de la debutanta

Ivan Naumov kaj, kunlabore kun la Liberecana Frakcio de SAT, la klasika *Interhelpo* de Kropotkin.

Same en Ruslando, ankaŭ Sezonoj maturigas ion en ĉiu sezono. La Jekaterinburga firmao surtabligis du fruktojn longe prizorgitajn: la 365-paĝa *Komputika leksikono* de la nova akademiano Sergio Pokrovskij estas, laŭ la aŭtoro, "luksaĵo kian malhavas multaj etnolingvoj ĝuantaj solidan ŝtatan subtenon". Samon oni povus diri pri la dika *La kunularo de l'ringo*, unua parto de la epopeeca rakontego *La mastro de l'ringoj* de Tolkien, en traduko de William Auld.

MZ-eldonejo de Harald Schicke (Germanio) plenigas breĉon per manlibro de naturkuracado, *Sanon!* de Jaime Scolnik. Schicke plu serĉas eldonindajn manuskriptojn fakajn.

De kie se ne el Usono povus veni *Mia indiana knabeco* de Luther Standing Bear tradukita de ĉefdelegito William Harmon? Krome Bero (Kali-fornio), kiun motoras Ionel Oneţ, regalas ankaŭ per hungaraĵo: *Unu-minutaj noveloj* de István Örkény.

Debutis ankoraŭ:

Lirikaj perloj el Andaluz', antologio de ok jarcentoj da iberia poezio (Hispana E-Federacio). *Asteriks kaj Kleopatra*, dua ero en la multpromesa bildstria serio de Izvori (Kroatio). *Survoje al universala civilizo*, eseo de Giordano Moya pri la homara evoluo (Barcelona E-Centro).

Kia abundo! Kaj ni pensu nur ke eldonejoj tiel fekundaj kiel Edistudio aŭ Pro Esperanto, eĉ ne estis reprezentitaj...

István Ertl


Nova Talento unuafoje el Ĉinio

En la magra jaro 1994 ni apenaŭ disdonis premiojn, sed 1995 denove abundas je premiindaj verkoj — ĝojis Osmo Buller, sekretario de la Belartaj Konkursoj. Li enkondukis la ceremonieton en kiu Michela Lipari, estrarano pri kulturo, transdonis 24 diplomojn: preskaŭ duoble pli ol en Seulo.

Efektive, neniam ekde 1988 alvenis tiom da konkursaĵoj (sume 120), kaj en ĉiu branĉo konkuris pli da verkoj ol meznombre en la lastaj jaroj. Aparte impresis la riĉa alfluo de eseoj (11, kompare al la kutimaj 4-6).

Pro la abunda distingiĝo de Gonçalo Neves (unua, dua, tria premioj plus honora mencio) kaj la rea sukceso de Liven Dek kaj Georgo Kamaĉo, ĉe la disdono de premioj denove regis iom iberetoso, kiel antaŭ du jaroj en Valencio. Al Liven Dek bonŝancon portas virinaj nomoj: lia *Laŭra* ricevis unuan premion en 1987, kaj nun *Marta kaj Maria* duan.

Mankis tamen novaj nomoj: senescepte ĉiuj gajnintoj en prozo, poezio, kaj teatro jam rikoltis premio(j)n en la Belartaj Konkursoj en antaŭaj jaroj. Sed novuloj ne perdu la kuraĝon: ili ankoraŭ povos fariĝi Nova Talento, kiel ĉi-foje Mao Zifu, 32-jara ĉino, kies poemojn oni povis legi ĝis nun



Ulrich Becker laŭtlegas sian novelon *La aĵoj kaj la sezonoj*.

interalie en *La Kanckerkliniko*, *Monato* kaj *Penseo*. Pripensu krome ke la ŝanco multe pli favoras vin ol en kutima loterio: ĉi-jare ĉiu kvina konkursaĵo estis diplomita!

Antaŭ centopa publiko, Becker laŭtlegis sian ĉefpremiitan prozaĵon, kaj Ertl prezentis *La plagiato*. Wera Blanke pruntis sian voĉon al Gonçalo Neves ("Kaŭkazo via"), Francisko Veuthey recitis "Se unu pasero falos" de Krys Ungar. La venkinta vidbendo, *Aragvaja Eko-krio*, estis publike montrata dum tuta tago.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1995

POEZIO: Unua premio: Gonçalo Neves (Portugalia) pro *Kaŭkazo via*; Dua premio: Gonçalo Neves pro *Suda pastoralo* kaj Krys Ungar (Britio) pro *Se unu pasero falos*; Tria premio ne aljuĝita. Honora mencio: Gonçalo Neves pro *Pereo*. Partoprenis 50 verkoj de 25 aŭtoroj el 17 landoj.

PROZO: Unua premio: Ulrich Becker (Germanio) pro *La aĵoj kaj la sezonoj*; Dua premio: Liven Dek (Hispanio) pro *Marta kaj Maria*; Tria premio: Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro *Neniam plu*. Honora mencio: Ulrich Becker pro *La venko* kaj István Ertl (Nederlando) pro *Plagiato*. Partoprenis 29 verkoj de 22 aŭtoroj el 15 landoj.

TEATRAĴOJ: Unua kaj dua premioj ne aljuĝitaj. Tria premio: Mike Sadler (Britio) pro *Venka* kaj Stefan MacGill (Hungario) pro *La serioza aĉetonto*. Honora mencio: Mike Sadler pro *Re*. Partoprenis 6 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: Kurisu Kei (Japanio) pro *Kiel Esperanto helpis al mi solvi enigmojn* de Riporto; Dua premio: Alberto García Fumero (Kubo) pro *Arkaika parolado en Esperanto* kaj Éva Tófalvi (Hungario) pro *La du testamentoj de Sándor Szathmári*; Tria premio: Gonçalo Neves (Portugalia) pro *La lirika itinero de Miguel Fernández*. Partoprenis 11 verkoj de 11 aŭtoroj el 10 landoj.

KANTO: Premio Ahn-Song-san: David Gaines (Usono) pro *Povas plori mi ne plu*; Dua premio: Tarcísio José de Lima (Brazilo) pro *Ĉia dolor*; Tria premio ne aljuĝita. Honora mencio: Tarcísio José de Lima pro *Kara kor*. Partoprenis 8 kantoj de 6 aŭtoroj el 6 landoj.

PREMIO "NOVA TALENTO": Mao Zifu (Ĉinio) pro la poemoj *La tuta vivo* kaj *Fendo*.

INFANLIBRO DE LA JARO: *La malgranda sorĉistino* de Otfried Preussler, tradukis E-amikoj de Durmersheim-Rastatt, eldonis Inter-Kulturo/Esperanto-Freunde (Slovenio/Germanio). Partoprenis 9 libroj de 4 eldonejoj.

VIDBENDO: Unua premio: Fondaĵo Eko-Kultura de la Okcidenta Centro (Brazilo) pro *Aragvaja Eko-krio*. Dua premio: Laŭzana E-Societo (Svislando) pro *La ega kesteto*. Tria premio ne aljuĝita. Honora mencio: Václav Vanc (Ĉeĥio) pro *Do, venonte en Ústí nad Labem*. Partoprenis 7 vidbendoj el 6 landoj.

jam haveblas

Comprehensive English-Esperanto Dictionary

de Peter J. Benson

Finfine! Longe atendita, ampleksa, moderna angla-Esperanta vortaro ne nur por britoj. Utila ankaŭ por neangloj kiuj volas plibonigi sian anglan lingvon. 607p. 215 x 140. Havebla en broŝurita (19,95 usonaj dolaroj) kaj bindita (26.95 usonaj dolaroj) versioj. Al la indikitaj prezoj, bonvolu aldoni 10% por sendokostoj.

Eldonis (1995): Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, USONO.

Nova estraro sur la estrado

Sama scenejo, simila reĝisorado, parte la samaj rolantoj en la Solena Fermo kiel en la inaŭguro — malgraŭ tio, en ĉiu UK tiuj du aranĝoj altiras la plej grandan publikon.

Sub la nova standardo, ĵus servinta en sia unua UK, videblis tamen ankaŭ novaj vizaĝoj: la estraro kiun la ĵusa elekto katapultis al la estrado (vd. p. 146). La podianaro ŝanĝiĝis je unu kroma loko: TEJO-n reprezentis nun vicsekretario Zdravka Bojčeva.

La nova prezidanto, LEE Chong-Yeong (prononcu: *li ĉong jong*) prezentis sin ("nomu min Ĉong") kaj sian skipon: "la nova Estraro estas definitive pli bona ol la malnova". Kiel sian movadan prioritaton li indikis instruadon de la lingvo, ĉar "en multaj lokaj grupoj oni parolas *pri* Esperanto, ne *en* Esperanto". Por ilustru sian estontan stilon de gvidado, li citis vortojn de Mahatma Gandhi: "Tie iras mia popolo. Mi devas sekvi ilin, ĉar mi estas ilia gvidanto!"

Post la raportoj de ĝenerala sekretario Mark Fettes pri la kongresaj laboroj kaj de Jouko Lindstedt pri la vizito al la prezidento de la respubliko, Martti Ahtisaari, Fettes laŭtlegis la kongresan rezolucion. Gvidate de Tuomo Grundström kaj Helen Fantom, anoj de la Infana Kongreseto salut-kantis. Grundström anoncis ke pretiĝos eldonaĵo pri la IK, kun la nomo *Planteto* — omaĝe al forpasinta aktivulo pri infana laboro, Niko Tumi, kiu redaktis samtitolan internacian infangazeton en Tampere dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj.

Povilas Jegorovas transdonis al CHOE Tae-ŝok, ĝenerala sekretario de Korea E-Asocio, la Trofeon Fyne, kiu iras en ĉiu dua jaro al landa asocio de UEA pro ties atingoj. KEA meritis la premion per signifa altigo de la membronombro — kiu kreskis precipe pro la modele organizita UK en Seulo —, per forta partopreno de la junularo en la landa movado, kaj per la utilaj kontaktoj kiujn ĝi flegas kun ekstermovadaj instancoj sociaj kaj sciencaj.

Renée Triolle anoncis ke Subvencio Cigno, kiun ricevas aktivulo, organizaĵo aŭ movada projekto en evoluoj (inkluzive Orientan Eŭropon), ĉi-jare iras al Bulgara E-Asocio por

Fondaĵo Socio kaj Esperanto, kaj al Litova E-Asocio por la Esperanto-domo en Kaunas. Tiun subvencion donacas japano, kiu ĉi-okaze forlasis sian ĝisnunan anonimecon: temas pri Etsuo Miyoshi, 55-jara kompaniestro, kiu en la pasintaj monatoj intense lernis Esperanton de hejma instruisto. (Antaŭ unu jaro aperis en nia revuo anonco serĉe al privata E-instruanto por li.) Tre aplaŭdate, li rakontis al la kongresanaro kiel li, post junaĝa amo nereciprokata pro lia korpa handikapo, renkontis Esperanton "kiel amatinon".

Malmultaj homoj tiugrade formis per siaj verkoj kaj ideoj la nuntempajn kulturon kaj idearon de Esperantio kiel William Auld, la ĉi-foja ricevanto de Premio Deguchi, kiun donacas la japana religia movado Oomoto. La dankparolado de la forestanta premiito estis voĉlegita de Simo Milojević. (Legu ĝin en nia oktobra numero.)

Post muzika interludo de Teresita Alaniz, Osmo Buller prezentis la novan Honoran Membron Hugo Röllinger,

Michela Lipari anoncis la rezultojn de Belartaj Konkursoj, Amri Wandel raportis pri la unuafoja kunlaboro de Internacia Kongresa Universitato kaj Akademio Internacia de la Sciencoj, Zdravka Bojčeva resumis la junularan programon de la kongreso, kaj Mark Fettes detalas la rezultojn de la dumkongresa informa laboro.

Por helpi al Lee pri la prononco de finnaj nomoj, la LKK-prezidanto Jukka Laaksonen mem prezentis ĉiujn membrojn de la LKK, kies ekzemplan sindediĉon la publiko dankis per varma aplaŭdo. Kio estis la sekreto de ilia efikeco? Tio ke ilia laboro daŭris ne malpli ol kvin jarojn — rivelis Laaksonen, kiu nun povis transdoni la kongresan flagon al Vlastimil Kočvara, lia kolego pri la sekva UK en la ĉeĥa ĉefurbo. Kočvara emfazis ke la nuna Prago alojas historian heredaĵon de la ĉeĥa, germana kaj juda kulturoj; nia venonta kongreso aldonu pluan kulturan dimension.

Kiel je la fino de ĉiu UK, tiu perspektivo de denova renkontiĝo faciligis la adiaŭon por la preskaŭ du mil kantantoj de "La espero", kies pretaj valizoj jam atendis hejmeniron — aŭ pluajn aventurojn en postkongresoj.

ie

Kongresa rezolucio

Universala Esperanto-Asocio,

salutante la 50-jaran jubileon de Unuiĝintaj Nacioj,

diskutinte pri la temo "Ni, la popoloj": unu mondo aŭ disaj eroj?" kadre de sia 80-a Universala Kongreso de Esperanto, kie kunvenis pli ol 2400 kongresanoj el 68 landoj de ĉiuj kontinentoj,

memorigante ke la Esperanto-movado laboras jam de pli ol unu jarcento por disvastigi konscion pri la homaj rajtoj, inkluzive de lingvaj rajtoj, kaj por estigi pacan interkompreniĝon inter la homoj de ĉiuj landoj,

alte taksas la kontribuojn de Unuiĝintaj Nacioj al la paca solvo de konfliktoj, al la tutmondigo de la koncepto pri homaj rajtoj, kaj al la konservado de la vivmedio, esperas ke per komuna kaj urĝa klopodo de la membroŝtatoj de UN tiaj agadoj fariĝos pli efikaj kaj rezultodonaj, interalie per ĉesigo de ĉiuj programoj por evoluigi armilojn de amasa detruado,

substrekas la nepran bezonon aktualigi la Ĉarton de UN por respondi al nuntempaj postuloj kaj aperontaj defioj, inkluzive rekonsideron de la principo de senkondiĉa ŝtata suvereneco,

alvokas la membroŝtatojn de UN trovi vojon al pli rekta kaj egaleca partopreno de la popoloj en la debatoj kaj decidoj de la Organizo, kaj lige kun tio

emfazas ke la lingvo Esperanto prezentas elstaran rimedon por tutmonda sendiskriminacia komunikado, je niveloj interŝtata, interpopola kaj interhoma, laŭ la celoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj en la spirito de la Ĉarto.

Kongresa kroniko

Artistoj: Ne plu oficiale

Universala Artista Ligo de E-istoj ne plu estu oficiala fakorganizo de UEA pro manko de membroj: tiel decidis UALE-anoj el sep landoj, en kunveno gvidata de prezidantino Marija Pozder Almada.

Aŭkcio: Amuza eĉ sen mono

Pano kun memora surskribo, elegante binditaj manuskriptoj, memorlibro pri pionira kongreso, naciaj

vestaĵoj kaj kuriozaĵoj, raregaj libroj je altegaj prezoj, kaj — ne laste — malmultekostaj havindaĵoj estis haveblaj dum la aŭkcio. La tute eta numero 1 estis la plej multekosta aŭkciero: ja oportuna kongresnumero por la venonta UK. . . . La profito iris al Fondaĵo Ameriko, kiu subtenas la E-movadon en Latina Ameriko.

Jam tradicia estas la distra kvalito de tiu aranĝo, kaj eĉ sen mono oni povas amuziĝi. (W. Kirschstein)



Azio: Kontinenta kongreso

Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, establita en la pasinta UK, fiksas por si trijaran oficperiodon kaj decidis ke la azia kongreso okazu ĉiun trian jaron (la unua: 22-25 aŭgusto 1996, Ŝanhajo). La konsisto de la komisiono restas sama kiel antaŭe (vd. apr., p. 67), sed aldoniĝas WANG Jianbing (Ĉinio) kaj MA Young-tae (Koreio). DOI Ĉieko (Japanio), kiu ĝis nun eldonis la bultenon *Esperanto en Azio*, iĝas ankaŭ ĝia redaktoro, post la deĵorfinco de SO Gilsu. (CHOE Taesok)

Cseh-kursoj: Pli en la fino

Japanoj plej multas kaj en la Cseh-kurso (por lernantoj de E-o) kaj en la Cseh-seminario (por instruantoj), kiujn gvidis Atilio Orellana Rojas. La kurson komencis 20 personoj — kaj finis 33! Rezulte de la seminario (15 homoj), la listo de diplomitaj Cseh-instruistoj pliriĉiĝis per s-ino Kanae Hirose el Japanio. (M. v.d. Horst-Kolińska)

Ĉiĉeronoj: Esperanto profesie

Antaŭ pli ol tri jaroj deko da Tampereaj ĉiĉeronoj eklernis Esperanton por povi montri la urbon al E-grupoj. Rezulte, Marjatta Saari, Sirpa Kaupila kaj Pirkko Palenius gvidis en la kongreso duontagajn ekskursojn, kaj laboranto de la urba turisma oficejo, Jarmo Polvi, povis respondadi ĉe kongreseja ĝiĉeto al plej diversaj demandoj.

Informado: Fettes en CNN-elsendo

Naŭdek artikoloj en la landa gazetararo dum la kongresa semajno: tion ni plejparte danku al la ĉiutagaj gazetaraj komunikoj kaj konferencoj de la Gazetara Servo (estris ĝin Kalle Kniivilä).

Speciale *Aamulehti*, Tampereea sed tutlande signifa ĵurnalo, aperigis daŭre artikolojn dum la UK. La plej grandan taggazeton de Finnlando, *Helsingin Sanomat*, ŝajne “vekis” la novaĵo ke kvar zairianoj (i.a. Nduantoni Nangu, observanto en la Komitato) kaj unu ganaano ne ricevis vizojn por veni al la UK. Krome ĝi en la sama numero artikolis pri Esperanta arto kaj intervjuis Kniivilä pri Esperanto kiel lia hejma lingvo.

Demari, organo de la granda Socialdemokrata Partio, al kiu apartenis prezidento Ahtisaari, ne hezitis deklari en sia redakcia ĉefartikolo: “Oni devas adopti Esperanton kiel la oficialan lingvon de EU!”

Eksterlande la brita *The Guardian* presis surlokan raporton, aperintan ankaŭ en *The Gazette* (Montrealo). Komunikado de la inform-agentejo Reuter transprenis, ekzemple, *Segodnja* (Moskvo).

Pluraj radioj elsendis pri la kongreso, i.a. la kuba, kies redaktoro vizitis la UK-on. En la kongresa vendredo la renoma finna programo “El ĉiutaga monda politiko” temis plene pri Esperanto.

La lingva redakcio de la landa televido filmis dum pluraj tagoj en la

kongreso kaj en la Infana Kongreseto por du programoj prezentotaj en septembro kaj decembro. La loka televido intervjuis Osmo Buller kaj Michela Lipari antaŭ la kongreso kaj daŭre raportis dum la evento. Tutlandaj televid-novaĵoj menciis la UK-on.

Eĉ la tutmonde spektata usona ĉeno CNN dediĉis trionon de 15-minuta programo al Esperanto: post intervjuo kun lingvisto pri ebla komuna origino de lingvoj, sekvis rekta telefona interparolo kun Mark Fettes — en senmoka, eĉ simpatia tono. La elsendon finis prezento de lingvaj problemoj ĉe UN — kiujn Fettes ĵus aludis. Ankaŭ alia internacia kanalo, la eŭropa Euronews, raportis pri la UK.

Farita en Finnlando

Argilajn flutojn kaj potojn, lanajn vestaĵojn, herbo-teon, betulselajn ujojn, pilketojn kaj lignajn ludilojn ofertis vendejo de la kongreslanda asocio kaj la urba klubo sub la ŝildo "Farita en Finnlando".

Filatelio: Oficiala stampo

La tuta enhavo de la vestibla poŝtkesto estis provizita per la oficiala poŝta stampo de la UK: ĝi montris la kongresan simbolon, desegnititan de Pertti Nykänen.

Finna lingvo: Elĉerpiĝo

Minimume centoj da kongresanoj gustumis la tripartan fulmo-kurson de Raita Pyhälä pri la finna, ĉar 95 homoj prenis la dulingvan frazaron disdonatan tie. Eĉ pliajn oni deziris, sed la broŝuro elĉerpiĝis.

Geedziĝo dumkongresa

La e-ista Internacia Ĥoro kantis en la plej malnova protestanta preĝejo de Tampere, kiam du svedaj geesperantistoj, Nina Andersson kaj Kent Kilby, ĵuris al si reciproke fidelon tie, dum la kongresa lundo. Jen ili, sur la foto dekstre.

Infanoj: Feliĉa sorto

Apudlaga trankvilo, arbara kvieto... plus saŭno, naĝado, boatoj, multe da muziko, multe da babilado, kaj ekskursoj: jen la feliĉa sorto de 30 infanoj el 11 landoj, kiuj partoprenis la 29-an Internacian Infanan Kongreseton en Ruskeapää, ĉ. 35 km for de Tampere. Unuaj antaŭtimetoj baldaŭ forgesiĝis pro la bonkoreco de Helen Fantom kaj ŝia skipo: Sigrid Kivistö, Mary Tähtinen kaj Janina Tokarska. Laŭ unu juna partopreninto: "Treege bona kongreseto: grandan dankon al la organizantoj." (P. Gubbins)

Instruado: Mila en Gondolando

Kongresanoj amase konatiĝis kun la tutmonde kaj ĉiugeneracie uzebla vidbend-kurso *Mazi en Gondolando*: en speciala inaŭguro, en la libroservo, iuj eĉ en ekskursiva buso! La kompletoj de "Mazi" (du bendoj, libro kaj sonkasedo) grandkvante transdoniĝis al antaŭpagintoj, dum vendiĝis kaj mendigis pluaj. Oni povus diri ke la "panjo" de la Mazi-projekto, Mila van der Horst-Kolińska de Internacia E-Instituto, kongresis... en Gondolando!

Katoj: En propra rondo

Pentti Törmälä iĝis la unua honora membro de Rondo Kato, kiun li fondis antaŭ ok jaroj. Nun la Rondo kunigas en 24 landoj "esperantistojn kiuj ŝatas bestojn kaj speciale katojn". La dumkongresa kunveno de Rondo Kato en Tampere estis neatendite amasa: 62 kunvenintoj volis aŭdi pri, ekzemple, kiel englutigi kontraŭkoncipaĵojn al katoj. Multaj aliĝis surloke. La Rondo donis al si pli organizitan strukturon, kun prezidanto: Marjorie Boulton. Komunan bultenon plu redaktas Ingrid Näsholm (Linder-



Ĵurnalistoj: Ĉu dinosaŭroj?

Antaŭ 34 membroj kaj 13 interesitoj la prezidanto de Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio (TEJA), Stefan Maul, pentris sombran bildon pri la mondo de gazetoj: aspekto kaj prezentmaniero iĝas ĉiam pli grava ol informa enhavo. Ĉu baldaŭ E-ĵurnalistoj estos la lastaj mohikanoj (aŭ dinosaŭroj) de serioza informado?

Oni decidis aranĝi trejnkurson por ĵurnalistoj dum la venonta UK, kunlabori kun AERA (vd. ĉe "Radio"),



bergsgatan 4, SE-853 56 Sundsvall, Svedio). Kiel emblemon de la Rondo, oni elektis la ĉi-supran desegnaĵon de Francisco Veuthey.

Kuriero: Vekilo ĉiumatena

Ĉu komenca presezaro, riparita per ripeta vortludado? "Kariero, kariolo, karuselo, kaserolo, katedralo, kalandrilo, kalemburo": neniam kongresa kuriero tiom ludis per sia mem-difino kiel *Vekilo Kongresa*, kiu kromtitolis sin ĉiutage per alia ŝerceto en la kaplinio. Ĝi tamen estis serioza, temoriĉa kaj fidinda, krome — kio aparte gravas en la malfacila ĝenro "kongresa kuriero" — ĉiumatene akurata. Ni multe dankas redaktoron Jukka Pietiläinen kaj enpaĝiganton Ilkka Santtila, kiuj laboris kun monaha sindediĉo, pro la informoj "hereditaj" al nia revuo por tiu ĉi numero.

kaj ekpretigi fakterminaron. En la reelektita estraro novas nur la ĝenerala sekretario YAMASAKI Seikō.

TEJA-anoj vizitis la fakon pri ĵurnalismo kaj amaskomunikado de la Tampere universitato kaj aŭdis prelegon pri la situacio de siaj finnaj kolegoj. "Praktikan demonstiron" donis en posta tago Hannu Olkinuora, ĉefredaktoro de la regiona taggazeto *Aamulehti*, kiu prezentis ties redaktejon kaj rakontis pri lastatempaj ŝanĝiĝoj en la profesio.

Frekvencoŝanĝo ĉe Pola Radio

13.30 (15.30 laŭ Mez-Eŭropa Tempo): 6000, 7145, 7285, 9525 kHz
20.30 (22.30): 6035, 6095 kHz

La dikaj ciferoj signas du novajn frekvencojn.

Senpage mendeblas (Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Pf. 46, PL-00-977 Warszawa) E-lingva broŝuro de Jerzy Marek Nowakowski, estro de la Eksterlanda Servo, pri la historio de tiu Servo.

Kvizo: Sudo en la ludo

Ĉu pro sia relative suda origino la teamanoj Jak Le Puil, Jeannine Vincent (Francio) kaj Luis E. Hernández García (Hispanio), gajnintoj de la primovada kvizo, elektis por si la portugalecan nomon "De saŭdad" al saŭnad"? Sudaj sprito kaj vervo animis ankaŭ la demandojn kunmetitajn de Giulio Cappa, la ludogvidadon de Ana Manero, kaj la kison per kiu Michela Lipari gratulis la "saŭdadanon" Le Puil. Lia teamo premiigis nordece, per la ĉefverko *Kalevala*.

Legantoj: Konsekvence pri sekso

Kunlaborantoj de *Litova Stelo*, *El Popola Ĉinio* kaj *Esperanto* renkontiĝis kun legantoj. La redakcion de EPĈ oni aparte laŭdis pro ĝia Fondaĵo EPĈ-abono (subtenebla per la UEA-konto "elpc-e"), dank' al kiu kelkcent e-istoj nepagipovaj regule ĝuas EPĈ. Legantoj de nia revuo instigis varbi pagitajn anoncojn el ekster la movado; plejmulto opiniis ke troas recenzoj en *Esperanto*; aliaj insistis pri konsekvence indikado de la sekso ĉe nomoj.

Lins: Prefere karavane

La ĵus-eksa UEA-vicprezidanto Ulrich Lins alvojaĝis Tampereon en la buso de la litova kongresa karavano. Li faris tuttagan ekskurson kun la rusa karavano. Li vespermanĝis kun la karavano de Japania E-Instituto. Kun kiu li karavanas al la UK en Prago?



ZEO: Lee plantis Esperanto-arbon

La unua tasko de la nova UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong estis planti arbon en la parko apud la kongresejo. Asistis (de maldekstre): Lauri Häkli, vicprezidanto de la loka E-societo; Reijo Hautala, municipa direktoro pri urba planado; Jukka Pietiläinen, prezidanto de E-Asocio de Finnlando, kaj Osmo Buller. La Esperanto-arbo, baldaŭ akompanota de dulingva memoriga ŝildo pri la UK, probable estas la plej freŝdata ZEO ("Zamenhof/Esperanto-objekto") en la mondo.

Radio: AERA-lanĉo

Reprezentantoj de la radioj Ĉina, Kuba, Estona, Pola kaj Melburna salutis ĉ. 60 aŭskultantojn. La estro de la Eksterlanda Servo de Pola Radio, Jerzy Marek Nowakowski, raportis pri la transformiĝo de Pola Radio en publikan radion.

Bruno Masala (2 rue des Vignes, FR-57530 Coincy, Francio) informis pri Amikaro de Esperanto en Radio (AERA), nova organizaĵo kiu celas progresigi la parolan E-kulturon, helpi vastigon de la aplikado de E-o en radiostacioj, iniciati novajn E-elsendojn, liveri konstantajn ĝisdatigojn al la membroj pri frekvencaro, adresoj ktp. AERA estas gvidata de Andrzej Pettyn (Pollando); kunlaboras Masala kaj Ahto Kaljusaar (Estonio).

Samseksamuloj: LSG pli videblas

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj jarkunvenis dudekope ĉe loka geja grupo ge-triopa, kiu regalas per kafo kaj interŝanĝis informojn pri geja vivo tra la mondo. Oni elektis novan estraron, solene memoris forpasintajn anojn. LSG decidis ke ĝiaj estontaj jarkunvenoj okazos plene en la kadro de la UK-oj, en la kongresejo mem. (A. Victor)

Sociala fakasocio fondota

13 personoj el 4 landoj elektis laborgrupon por prepari statuton kaj fondkunvenon de faka asocio por e-istoj kiuj laboras en socialaj fakoj. Kontaktu: s-ino Soile Lingman, Västerås-gatan 4, SE-113 43 Stockholm, Svedio.

Stenografio: Nova sistemo

Hemmo Tietti (Finnlando) gvidis kurson pri stenografio. Li klarigis la novajn apliko-kampojn de stenografio en la moderna mondo kaj montris manieron de lernado. Kongresa libro-novaĵo, *Sonosteno* de Joseph Gamble, proponas "tre rapidan, preseblan, ĝeneralan skribon por multaj lingvoj". Recenzo en venonta numero klarigos ĝian rilaton al pli fruaj sistemoj.

Verkistoj: EVA kolokvos

Esperantlingva Verkista Asocio havas novan kasiston: Paul Peeraerts. EVA planas vigligi la membrojn per dissendota enketilo kaj per kolokvo tuj post aŭ tuj antaŭ la UK en Prago. Ree funkcios EVA-konkurso, ĉiun duan jaron, pri libroforme aperigotaj verkoj. (G. Berveling)

Ekscitaj ekspozicioj

Antaŭ kelkaj jaroj la sola **Lenin-muzeo** ekster la socialismaj landoj estis tiu en Tampere. Ĉu nun ĝi estas eble eĉ tutmonde sola? En tiu unika stablo Ulrich Lins inaŭguris ekspozicion de la germana Instituto Fritz Hüser pri la laborista Esperanto-movado, kiu iom turneis en la mondo ekde la Valencia UK. La vizitantoj povis krome vidi konstantan ekspozicion pri la vivo de Lenin kaj pri liaj rilatoj kun Finnlando, plus modernan Lenin-teman arton.

En siaj liberaj momentoj la kongresanoj povis senti sin eĉ en arthalo, pro la nekutima multeco de ekspozicioj en la kafejo-maĝejo kaj aliloke. Siajn **penetraĵojn** aparte prezentis la esperantistaj artistoj USUI Hiroyuki (Japanio, kies bildkarte eldonitaj penetraĵoj estas haveblaj ĉe UEA), Cécile Anda (Francio/Norvegio), Marija Pozder Almada (Brazilo) kaj Lauri Häkli (delegito pri pentro-arto en Tampere).

La ekspozicion pri **E-poŝtmarkoj** kolektis kaj planis Terttu Österman dum preskaŭ 20 jaroj. Ĝi jam ricevis premiojn, eksterlandajn kaj finnajn. Post la UK la kolekto ekiris al filatela ekspozicio en Singapuro.

En la enirhalo de la amasloĝejo la finna **manteksaĵa arto** prezentis sin pere de puntoj faritaj de Eini Kilpinen.

Videblis kolekto de tre malgrandaj artformoj: **ekslibrisoj** de esperantistoj.

Esperanto en Visby (Svedio) preparis panelojn pri dekdio da **radio-stacioj** kiuj disaŭdigas elsendojn en aŭ pri Esperanto, de Estonio ĝis Brazilo.

Sanigas nekuraĉeblajn malsanojn, bonigas farton,
donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio
de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.

Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto
kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko,
CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

La plej granda en la mondo!



LIBROSERVO DE UEA

Stokas ĉiun haveblan Esperanto-libron •
Rabatas ekde tri ekzempleroj • Sendokostoj
nur 10% • Rapida servo • Katalogo 9,00 gld.

La 27-a Korea Kongreso de Esperanto

okazos en la 28-a kaj 29-a de oktobro 1995 en la
urbo Iksan. Ĝi kun la antaŭkongreso havos interesajn
programojn speciale por eksterlandanoj kaj ofertas
bonegan ŝancon ĝui la plej altan kaj bluan ĉielon de
la korea aŭtuno. Partoprenkotizo por eksterlandanoj:
40 USD.

Detalajn informojn petu ĉe Korea Esperanto-Asocio:
CPO Kesto 4258, Seulo, Koreio 100-642.

Tel.: 82-2-614-5784, fakso: 82-2-614-5785

Reto: keast@soback.kornet.nm.kr

Tri-virina boato serĉas viran havenon

La reĝino Julieta (48j; 1.62 m; 62 kg; magra) kaj la
princinoj Michaela (17j) kaj Pressiana (16j) ŝatus for-
lasi Bulgarijon, lerni plusan lingvon kaj feliĉigi kuraĝan
viron per partnereco kunvivo. Julieta, divorcinta, parolas
6 lingvojn (an, fr, ru, sv, bg, Esperanto), estas bonkora,
hejmema kaj tenerema. Ŝiaj hobiaj estas: lingvoj,
muziko, vestaj-kudrado, korespondado, internaciaj
kontaktoj, naturo. Kuraĝu skribi al ŝi, se eblas almetu
foton, laŭ la adreso: Julieta Simeonova, Nova Mahala
St. 6A, Gabrovo, BG-5310 Bulgario.



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan
kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin
kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU,
imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

Jen unika ŝanco

Ricevu senpage 3 sinsekvajn numerojn de la gazeto *Brazila Heroldo*,
kiu laŭ la juna numero de la revuo *Esperanto* "nepre meritas ankaŭ
internacian atenton". Nur poste vi pensos pri abono.

Brazila Heroldo

Aperas monate

E-movado	Politiko	Sporto	Informadiko	Diversaĵoj
Kulturo	Ekonomio	Scienco	Turismo	

Suplementoj

Facila – Trimonata gazeto por komencantoj

Panoramo de Interlingvistiko kaj Esperantologio – Jara kajero

SENDU VIAN NOMON KAJ ADRESON AL

ZAMENHOF EDITORES

CAIXA POSTAL 1887

01059-970 SAN-PAULO-SP

BRAZILIO

“Imagoj pri Afriko:

Kontinento de espero aŭ de malespero?”

KVARA AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO

28 decembro 1995 – 2 januaro 1996

ĉe Kilimanĝaro en Tanzanio

La kotizo de 620 NLG inkluzivas ses tra-
noktojn, plenan manĝon dum ses tagoj,
la programon kaj tuttagan ekskurson al
la Nacia Parko Aruŝa. Diversaj ebloj por
postkongresaj ekskursoj: ekzemple 5-taga
migrado al Kilimanĝaro (690 NLG) kaj
3-taga tendosafario (620 NLG). Karavana
flugo el Amsterdamo, kun ekflugo la 26-an
de decembro kaj reflugo la 9-an de januaro,
kostas 1980 NLG; eventuale estos aliaj
konektaj flugoj el aliaj urboj en Eŭropo,
se sufiĉos por tio la nombro de aliĝintoj.
Informiĝu ĉe la Centra Oficejo de UEA.

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo,
1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

Ĉapelilo 1.0

Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsisistemo kaj manipulado pure en Esperanto. Ankaŭ por novuloj facilege majstrebla. Esperantaj kaj nacilingvaj signoj sur ekrano kaj printilo. Skaleblaj tiparoj por ĉiuj aplikoj. Ĉiuj necesaj funkcioj por alloge aranĝi vian tekston. Literumad-kontrolilo baze de redakteblaj vortaroj kun pli ol 120 000 vortoj. Disadresada funkcio. Importo kaj eksporto per diversaj formatoj por interŝanĝo. Grafikaĵoj integreblaj.

Enkonduka prezo nur 200 germ. markoj plus ekspedo. – Tuj mendu! Esperanto parolata!

Tel: +49-6081-66722, faksilo: +49-6081-3955, reto: 100103.24@compuserve.com
Professional Consulting, s-ro PEJNO Simono, Am Füllgarten 4, DE-61250 Usingen

Abonu al

Internacia Ĵurnalisto

La fakrevuo por ĉiu, kiu verkas,
artikolas, informas.

4 numeroj – redaktoro: Stefan Maul

Jara abon-kotizo

30 germanaj markoj

aŭ egalvaloro.

Simple pagu al

UEA-konto **ttmj-f.**

Konto **tejh-u** ĉe

Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen, Belgio

(Ĉe sama adreso vi ricevas
provekzempleron kontraŭ 4 internaciaj
respondkuponoj – Se vi volas membriĝi
en Tutmonda Esperantista Ĵurnalista
Asocio, petu senpagan informilon.)

*“Se ekzistus en la realo la lando Esperantujo,
jen unu el la tekstoj, kiujn oni certe legus
en ĉiuj mezgradaj lernejoj.”*

RENATO CORSETTI



La nova 18-a eldono, printita de prof. G. Waringhien, faras maksimumajn klopodojn tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954.

18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj kromkovrilo. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde 3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!



12-A INTERNACIA FESTIVALO

la jarfina aranĝo por familioj
kaj personoj 25-55 jaraĝaj
27 dec. 1995 - 3 jan. 1996

Inf.: H. D. Platz, Fakso +49-5624-322

Adr.: Pf. 1148, DE-34303 NIEDENSTEIN

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikaĵojn.



“Ĉu vi parolas tendare?” estis origine verkita por instrui Esperanton dum labortendaroj. Hodiaŭ, kiam tiuj aranĝoj malpli furoras, tamen necesis ...

...4-a eldono!

Ĉu vi parolas tendare?
Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Roterdamo: TEJO, 1992 (4-a eld.).
21cm. 12,00 gld. Triona rabato ekde
3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

